

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Daŝgupto: Ni
forlasu niajn
retorikojn**



**Pollando:
Naskiĝdomo
de Zamenhof
rekonstruota**



**Kubo: Alispeca
turismo pere
de Esperanto**



Altaj aspiroj en nova jaro

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA:
Antaŭeneme al ŝancoj kaj defioj (LEE Chong-Yeong)
- 2 Kampanjo 2000: Pri la stato de la Kampanjo (Renato Corsetti)
- 4 Historio: Vigodskij: dokumenteble esperantisto (Jean Amouroux)
- 5 Eŭropo: Evidente helpi en Albanio (Bardhyl Selimi Mezini);
Centra Renkontejo, sepan fojon
- 6 Eŭropo: Malstreĉi la atmosferon (Andrzej Pettyn);
Esperanto-Centro Bjalistoka (Andrzej Zejdler)
- 7 Reagoj: Ankaŭ Kanado aŭŝis (Paul Hopkins); Senceremonie
(Lilia Fabretto); Diana (Louis Bourdon); Senaga Tago (Ionel Onet);
Pen-rin-doj-drajt (C. A. Shriveres)
- 8 Ameriko: Alispeca turismado en Kubo (Vilhelmo Lutermano)
- 9 Literaturo: Stafeto tra tempoj kaj lingvoj;
Stafeto al feliĉo (Jan Werner)
- 10 Forumo: Malgrimpi de niaj retorikoj (Probal Daŝgupto);
Kial usonano uzas Esperanton? (Joel Brozovsky);
Dumvivaj avantaĝoj (YAMASAKI Seikō)
- 12 Recenzoj: *La manto* (Sylvan Zaft); *La korpo de la homo* (Blaise
Berthonneau); *La bildstria gvido al genetiko* (Leszek Kordylewski);
Receptaro de kuracaj plantoj, Sanon!, Sin nutri en la naturo
(Hubertus M. Schweizer); *Ĝis revido krokodilido!* (Jorge Camacho);
Al la mondo donace (Jouko Lindstedt); *La maŝino kiu kriis*
(Aldo de' Giorgi)
- 15 Laste aperis
- 16 Foliume
- 17 Loke – Fake
- 19 Anoncetoj
- 20 Nekrologoj; Oficiala informilo

Vi trovos

numero-meze pledon de Probal Daŝgupto (p. 10) por ke ni “malgrimpu de la retoriko-montoj kie ni kaptilas nin”, ĉar ne eblas kunlaboro “se ĉiu heroo volos [...] soli sur sia atingita monto farita el roke firma retoriko”. Jen teksto malfacila je unua lego, sed kiu indas relegon kaj pripenon: sobra enkonduko al nova jaro, en kiu espereble superregos etoso de esperantisma kunagemo. La parolantaro kaj amikaro de nia lingvo ja “ne estas aŭ movado aŭ komunumo sed kaj movado kaj komunumo” — laŭ la “ekumena” memorigo de prezidanto LEE Chong-Yeong en sia novjara saluto (p. 1).

Ja pli ol apartigemoj gravas la faktoroj komunigaj, kaj Esperanto estas unika komunigilo. Se necesas plia pruvo pri tio, sufiĉas legi la elokventan tekston de Joel Brozovsky (p. 11) pri la kialoj de usonano preferi Esperanton al la angla kiel proksimigilon interhoman.

La kovrilo: Ke la bunta grafikaĵo de Franĉjo Veuthey montras la Centran Oficejon kiel simbolon de la 90-jariĝanta UEA, tio ne estas memcentrismo: simple, estus malpli facile bildigi aron da aliĝintaj asocioj, milojn da membroj, nenombreblajn ideojn, iniciatojn kaj agadojn...

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). **Establiĝita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2060, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-652-4488 [of], +82-53-765-0880 [h]; ✉ +82-53-652-8141 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ✉ +39-6-39-72-61-69; ✉ mc8750@mclink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ✉ +31-50-3613763 [of]; ✉ A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ✉ +1-613-565-9279; ✉ mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ✉ +370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ✉ +972-2-658-4437 [of]; ✉ amri@vms.huji.ac.il.

Antaŭeneme al ŝancoj kaj defioj

Mi kaj la estraranoj de Universala Esperanto-Asocio deziras plej feliĉan kaj esperplenan novan jaron al ĉiuj membroj kaj al ĉiuj esperantistoj en la mondo kaj al iliaj familioj!

Kiam, antaŭ pli ol unu jarcento, Zamenhof publikigis la Unuan Libron, la internaciiganta mondo suferis de neinterkompreno inter la nacioj pro la malsameco de iliaj lingvoj. Per Esperanto Zamenhof celis faciligi la lingvan interkomunikadon.

La malsameco de lingvoj plu estas la bazo de la lingva problemo en la mondo. Sed nuntempe al ĝi aldoniĝas kaj ĝin pligravigas la tendenco uzi unu etnan lingvon kiel faktan komunan lingvon. La trudo de unu etna lingvo kiel efektiva komuna lingvo de la internacia vivo portas kun si diversajn problemojn, interalie kulturan trudon. Sed la plej grava kaj eĉ detrua problemo estas ke tia etna lingvo estas lingvovora. Ĝi voras aliajn naciajn lingvojn sur la kampoj de internaciaj kunvenoj, komerco, scienco, teknologio kaj turismo. La plifortiĝo de la lingvo- kaj kulturvora tendenco de etna lingvo jam instigis reprezentantojn de politike fortaj lingvoj al memdefendo kontraŭ lingva hegemonio. Ili komencis starigi diversajn kontraŭrimedojn.

Ironie, la vera lingva problemo en Unuiĝintaj Nacioj kaj Eŭropa Unio kuŝas ne en manko de interkompreno inter naciaj delegacioj pro ties malsamaj lingvoj, sed en la efektiva komunlingviĝo de unusola etna lingvo. UN kaj EU uzas 6 respektive 11 oficialajn lingvojn pere de tradukistoj, ne pro lingva neinterkompreno inter iliaj stabanoj kaj ŝtataj delegacioj, sed pro politika motivo, nome por kontraŭi lingvan hegemonion. Malhelpi lingvan hegemonion estas nun granda problemo en la internaciaj organizaĵoj, kvankam ili ne emas oficiale agnoski tion. Ili estas sub premego trovi taŭgan solvon. En la kazo de EU tiu solvo povus esti ŝlosilo al efektiva eŭropa unuiĝo, eĉ pli grava ŝlosilo ol la mona unuiĝo. Jen ŝanco por Esperanto, neŭtrala komuna lingvo pruvinta sian valoron dum 110 jaroj!

En Adelajdo la Komitato de UEA lanĉis Kampanjon 2000. Unu el ĝiaj celoj estas krei favoran atmosferon ĉe internaciaj organizaĵoj, por ke ili rekonu kaj studu la eblecon de neŭtrala komuna lingvo. Kampanjo 2000 celas ankaŭ

instigi la esperantistaron agadi por levi la idean kaj organizan nivelon de nia movado. Esperanto estas vivanta lingvo, kaj ĝi devas kreski. Ĝi ne estas *aŭ* movado *aŭ* komunumo sed *kaj* movado *kaj* komunumo. Kampanjo 2000 celas fortigi kaj grandigi la komunumon de Esperanto kaj antaŭenigi ĝian movadon. Tio signifas interalie ke ni devas pli alte montri nian lingvon en la ne-Esperanta mondo.

En tiu kampo mi fieras raporti pri kelkaj el niaj lastatempaj sukcesoj. En la pasinta jaro Unesko rekonfirmis la statuson de UEA kiel oficiala partnero de tiu grava monda organizaĵo. En novembro UEA estis elektita kiel membro de Konsilio de Neregistaraj Organizaĵoj havantaj oficialajn rilatojn kun Unesko. Krome, Unesko ĵus asignis operaciajn rilatojn ankaŭ al Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. La sukceso de UEA kaj ILEI estas fierinda, ĉar nur duono el la organizaĵoj antaŭe agnoskitaj de Unesko konservis tiun prestiĝan statuson. Kelkaj fakaj Esperanto-asocioj establis kontaktojn kun samfakaj internaciaj organizaĵoj. Ĉe la sidejo de UN en Novjorko UEA sukcese iniciatis fondon de Koalicio de Neregistaraj Organizaĵoj por Internacia Lingvo. En aprilo de la nova jaro UEA okazigos ĉe la sidejo de UN en Genevo seminarion pri lingvaj dimensioj de homaj rajtoj, kun oficiala subteno de la Alta Komisiito de UN por Homaj Rajtoj. Per ĝi ni

omaĝos al la 50-jariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj al la 90-jariĝo de UEA mem. Estas nature festi tiujn datrevenojn samtempe, ĉar jam unu jaron antaŭ la akcepto de la Universala Deklaracio UEA skribis en sia Statuto ke "la respekto de homaj rajtoj estas por ĝia [de UEA] laboro esenca kondiĉo".

Sojle de nova jarcento mi vidas esperon kaj novajn ŝancojn. En la nova jarcento la monda komunumo bezonos novan internacian lingvan ordon. Esperanto estas la lingvo por la 21-a jarcento! Tial mi nun, komence de la nova jaro, alvokas ĉiujn esperantistojn kaj Esperanto-grupojn: lokajn, landajn kaj fakajn, etajn kaj grandajn, ke ili imitu la antaŭenemon kiu markis la diskutojn de la Komitato de UEA en Adelajdo. Mi apelacias por pli forta al ekstera agado, laŭ la Praga Manifesto de la Esperantomovado. Ni atentigu la internacian komunumon pri Esperanto kaj konigu ĝin, ĉiu en sia propra medio!

Jen novjaraj defioj por ni ĉiuj. Kadre de Kampanjo 2000 ĉiuj membroj, ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj, kaj ĉiaspecaj Esperantaj komunumoj tra la mondo kaptu la ŝancojn kaj alfrontu tiujn defiojn. Ne estas pli taŭga maniero omaĝi al la 90-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio.

LEE Chong-Yeong



La laborantoj de la Centra Oficejo dankas pro ĉies jarfinaj salutoj kaj bondeziroj, kiujn ili plej kore reciprokas.

Pri la stato de la Kampanjo

Proksimume nur ses monatoj pasis de post la decido de la Komitato en Adelajdo lanĉi Kampanjon 2000. Jen provo resumi kio okazis kadre de la kampanjo en tiu tempo — periodo ne tre longa en nia mamuta movado.

Ekde la momento kiam iu lanĉas novan ideon ĝis la momento kiam la estraro de loka klubo estas informita kaj ekdiskutas pri ĝi, pasas multaj monatoj. Malgraŭ tio, pluraj aferoj jam ekk okazis, kaj mi klopodos nun raporti pri ili. Mi atentos ĉefe tiujn agadojn kiujn mi rekte konas (kiuj rilatas al la labor-programo de la centraj organoj de UEA), sed mi ankaŭ aludos al aliaj pri kiuj mi eksciis.

Organizado de la Kampanjo

En pluraj landoj la estraroj de la landaj asocioj diskutis pri la Kampanjo kaj starigis landan planon. Mi ne citos apartajn landojn pro timo forgesi kelkajn, sed jam ĉiuj kontinentoj estas koncernataj. Aliflanke en pluraj aliaj landoj, eĉ iuj kun forta movado, oni ankoraŭ ne donis la necesan atenton al la Kampanjo. Eble tie oni opinias sin sufiĉe forta por ne bezoni pluajn kampanjojn. Aliaj ŝajne opinias ke Kampanjo 2000 ne estas sufiĉe ambicia: ĝi ne promesas la finan venkon ĝis la jaro 2000 aŭ 2005; ĝi ne aspiras ke Esperanto estu instruata en ĉiuj lernejoj ekde la venonta jaro ktp.

Nu, la legantoj juĝu mem ĉu ili volas kredi al profetoj de nerealegeblaj mirakloj aŭ al raciaj invitoj laboregi por atingeblaj rezultoj.


Tre pozitiva estis la respondo al la alvoko sendita al ĉiuspecaj aliaj Esperanto-organizaĵoj, invitanta ilin kunlabori kun UEA por la komuna celo antaŭenigi Esperanton. Proksimume 90 organizaĵoj — ĉefe fakaj asocioj sed ankaŭ aliaj (SAT, Akademio de Esperanto ktp) — estis invititaj eniri la Strategian Forumon de la Esperanto-Komunumo, kiu jam funkcias skribe kaj havos sian unuan kunvenon en la Universala Kongreso Montpeliera.

Ne ĉio, tamen, estas pozitiva. Ankoraŭ ne sentiĝas sufiĉe la apogo de la individuaj membroj, la nuraj kiuj povas puŝi siajn lokajn grupojn, landajn kaj fakajn asociojn fari ankoraŭ pli. Mankas iuspeca “folkloro” ĉirkaŭ la Kampanjo, kun glumarkoj kaj T-ĉemizoj, kiu povus bildige proksimigi la Kampanjon al ĉies koroj.

Ankoraŭ mankas amasa donacado al la UEA-konto de la Kampanjo, el kiu venos la mono — ekzemple — por inform-kampanji aktive, pere de ĵurnalaj anoncoj, en landoj kie Esperanto estas apenaŭ konata, kaj por similaj agadoj.

Levi la idean kaj organizan nivelojn

En pluraj landoj oni komencis aranĝi stud-seminariojn pri pluraj aspektoj de la Kampanjo. Kiam vi legos ĉi tiujn liniojn, verŝajne jam estos redaktita broŝuro klariganta



Ĉu parto de la laborprogramero “Pli vasta Verdujo”? Ĉe la Esperanto-grupo en Cartagena (Kolombio) gastas hungaro Péter Denke (maldekstre). Dekstre: pastro Luis E. Palacios Toral, loka delegito.

la diversajn punktojn de la Manifesto de la Esperanto-movado (aŭ de Prago, se vi preferas). Ĝi estos la bazo por plua diskutado inter ni kaj kun eksteruloj pri la baza demando: kiuj ni estas kaj kion ni volas. Ni povas noti kun kontento ke la nombro de individuaj subskriboj al la Manifesto superis 10 000.


Post la kolokvo pri la propedeŭtika valoro de Esperanto en Adelajdo, oni energie plu laboris, kunagante kun ILEI, pri la aliaj punktoj en la labor-programo de UEA kiuj tuŝas la instruadon en lernejoj.

La punkto “Trejnkursoj por instruistoj” trovas sian unuan realigon per kursoj en Grésillon (20-31 julio) antaŭ la Montpeliera UK, zorge de Katalin Smidélusz kaj Duncan Charters.

Antaŭeniras la “Seminario pri Esperanto en lernejoj” kunlabore kun Unesko. Vi jam legis pri la fortiĝo de la pozicio de UEA en Unesko (dec., p. 205), kaj tio ne povos ne influi pozitive ĉi tiun seminarion. Aliflanke, evidentiĝas la nepra bezono ke en ĉiuj landoj niaj asocioj kunlaboru kun la landaj Unesko-komisionoj. En Unesko, kiel en aliaj interŝtataj organizaĵoj, la vera potenco finfine kuŝas je la ŝtata nivelo. Kvankam simpatiaj funkciuloj de la Unesko-centro povas sendi brilajn mesaĝojn, fari aplaŭdve kajn paroladojn aŭ eĉ mem lerni Esperanton, nenio konkreta (ekz. subvencioj) povas esti ricevata se ŝtataj Unesko-komisionoj ne deklaras ke ili konkrete kunlaboras kun esperantistoj por konkretaj projektoj.

Kiu estas la mesaĝo kiu ni volas transdoni al vi? Esence temas pri jeno: “Belajn vortojn pri paco kaj intelekta kunlaboro ĉiu rajtas doni senpage. Konkretajn apogojn por

Kampanjo



Esperanto internaciaj funkciuloj ne rajtas doni, se ili ne estas petataj de la membro-ŝtatoj. Do, ne atendu ke Esperanto venkos en Parizo nur pro la braveco de niaj reprezentantoj tie. Ĝi venkos nur kiam ĝi estos venkinta en Nepalo, Germanujo, Togolando ktp.” Ankoraŭfoje: ne kedu je mirakloj, sed laboru por atingeblaj rezultoj.

Post la seminario venos la “landnivela eksperimenta instruado de Esperanto”.

Ankaŭ por tio ni bezonas ne nur la benon de Unesko (ĝi estas senpaga, do ricevebla), sed ankaŭ konkretajn lernejojn en diversaj landoj, tiajn en kiuj oni rajtas instrui

Esperanton. Jen denove granda kaj konkreta tasko por ILEI: trovi kaj listigi tiujn lernejojn. Sen tio, ĉio cetera estas kaj restas “belaj vortoj”.

En la kampo de altigo de nia idea kaj organiza nivelo situas ankaŭ la “90-jariĝa jubileo de UEA”. Oni festos ĝin per Malferma Tago de la Centra Oficejo la 25-an de aprilo en Roterdamo, kun pli abunda programo ol kutime.

Bone ekiris la projekto “Savu esperantaĵojn”. La paro Sabine kaj Christian Darbellay entuziasme eklaboris pri kolektado de informoj pri Esperanto-bibliotekoj kaj aliaj kolektoj. En Montpeliero okazos kunsido de respondeculoj de bibliotekoj kaj similaj centroj.

La projekto “Pli vasta Verdujo” portas la plej ĉarman nomon en la tuta laborprogramo. Ĝi kovras la klopodojn pliiigi la membronombro de UEA — kaj de ĉiuj ceteraj organizaĵoj. Ni ne volas kreski en soleco. Ni pensas ke la bono de Esperanto postulas kreskon de la membraro de UEA, SAT, ILEI, la nepala landa asocio, Rondo Kato, la Esperanto-societoj de Rio-Malgrande-do-Norte kaj Saint-Beaufront-sur-Mer, la aŭskultantaro de Pola Radio...

Levi la prestiĝon de la internacia lingvo

Nova kaj juna komisiito, Kalle Kniivilä, eklaboris pri la ĝenerala punkto “Disvastigo de informoj pri Esperanto kaj UEA”. Nova anglalingva informilo pri UEA estos preta tre baldaŭ.

Same oni estas laboranta pri la punkto “Krei hejmpaĝon de UEA en TTT”, kaj ankaŭ tie eble ni povas atendi baldaŭan ekkomencon de la paĝo.

Pri ĉio ĉi oni parolos ankaŭ dum la “Seminario pri rilatoj kun amaskomunikiloj” en Montpeliero, kies organizado kontentige progresas.

Intertempe en la malvarma Berlina vintro Detlev Blanke verkas la espereble plej legotan lingvistikan verkon de ĉi tiu jarcento. Tiu “Informilo por lingvistoj”, espereble preta en la venontaj monatoj, estos tradukita al naciaj lingvoj.

Ni ne raportas ĉi tie — pro la kutima prudento pri aferoj ankoraŭ en evoluo — pri la agadoj lanĉitaj diverslande sub la flago de Kampanjo 2000. Tamen, por montri kiel neelĉerpebla estas la fantazio de esperantistoj, ni volas ekzempli per almenaŭ unu evento, okazonta post la verkado de ĉi tiuj linioj. Esperanto-Centro Nord-Holando, kunlabora instanco de ĉiuj Esperanto-grupoj en la provinco

Kampanjo 2000 tramonde

La 43 partoprenintoj de la 51-a Argentina Esperanto-Kongreso kaj 4-a Interlanda Konferenco pri Instruado (Bonaero, 9-12 okt.) rezolucie rekomendis, “kongrue al la kongresa temo ‘Strategioj por eniri la ekster-Esperantan komunmon’, (...) ke la Esperanto-komunumo akceptu kunlabori por plenumo de la laborplano de Kampanjo 2000”. (R.T. Diaconu)

Preninte sugeston el Kampanjo 2000, Pistoja Esperanta Grupo (Nicola Morandi, Via dei Ciuti 49/e, IT-51033 Gello [PT], Italio; nmorandi@mail.promonet.it) preparas konstantan ekspozicion pri Esperanto en sia urbo Pistoia. La grupo do serĉas materialon — ekz. afiŝojn pri pasintaj kongresoj, seminarioj, festivaloj, malnovajn fotojn, gravuraĵojn, dokumentojn —, proponante repagon aŭ antaŭpagon de poŝtkostoj.

La estraro de Hungaria Esperanto-Asocio decidis pri la sekvaj agadoj kadre de Kampanjo 2000:

- delegita reto de HEA: Dum la sekvaj tri jaroj estos kontaktataj nunaj kaj iamaj esperantistoj (HEA havas en sia registro pli ol 21 000 adresojn) kaj petataj fariĝi kontaktpersonoj pri Esperanto. Ilia adresaro aperos en dulingva jarlibro;

- metado de turismaj informiloj en publike vizitatajn lokojn;

- kompilo de bibliografio de la revuoj *Hungara Vivo* kaj *Budapeŝta Informilo*;

- daŭrigo de la jam funkciaj korespondaj lingvo-kursoj por komencantoj kaj progresantoj.

La Esperanto-Redakcio de Pola Radio aŭdis kvar fojojn (6-8 dec.) ampleksan intervjuon kun Renato Corsetti pri Kampanjo 2000. Per ĉi tiu intervjuo Pola Radio lanĉis vastan diskutadon pri la praktika realigo de la Kampanjo.

☞ Nord-Holando, denove iniciatas la tradician Nordholandan Zamenhof-tagon, ĉi-foje en la urbeto Heerhugowaard, apud Alkmaar. Ĝi decidis fari tion kadre de Kampanjo 2000, do kapti la atenton de la ekstera publiko.

La loko de la evento estos Middenwaard, la plej granda butikcentro de la provinco, en kiu situas ankaŭ kinejoj kaj teatro. La granda teatro-salono estos enirebla la tutan sabaton la 13-an de decembro 1997 por la ekstera publiko. Kutime butikumas tie inter 4000 kaj 5000 personoj dum sabato. En la granda salono de la teatro okazos Monda Foiro, kie prezentiĝos internaciaj bonfaraj organizoj kiel Monda Natur-Fondumo, UNICEF, Greenpeace, Ruĝa Kruco ktp kaj Esperanto-organizoj kiel Nederlanda Esperanto-Junularo, TANEF (naturamikoj) kaj la nederlanda ILEI-sekcio. En la teatra salono la publiko povos konatiĝi kun Esperanto pere de la interaga instru-panelo de Skolta Esperanto-Ligo, per televida prezento de *Mazi en Gondolando* kaj per komputila prezento de Esperanto-kurso en Interreto. Da tiaj eventoj en la mondo okazos pluraj.

Influi la internacian vivon

Kiel vi povis legi en la novjara saluto de nia prezidanto

(p. 1), UEA aranĝos, la 28-an de aprilo, “Seminario pri lingvaj dimensioj de homaj rajtoj”.

Daŭras intertempe en Novjorko la kampanjo por surtagordigi Esperanton ĉe la Ekonomia kaj Sociala Konsilio de UN, same kiel la klopodoj plivastigi la Koalicion de Neregistaraj Organizaĵoj por Internacia Lingvo.

La Laborgrupo pri lingva problemo en EU laboras tre cel-konscie. Vi certe legos baldaŭ en ĉi tiu kaj en aliaj revuoj pri la seminario kiun ĝi iniciatis por vekti la konscion de eŭro-parlamentanoj pri la lingva problemo.

Ekzistas ankaŭ amaso da aliaj planoj, de “Junulara simpozio pri lingvo-politiko” planita de TEJO ĝis la dua Nitobe-simpozio okazonta dum la Universala Kongreso en Berlino (1999), sed por paroli pri ili ni certe trovos alian okazon.

Konklude

Kiel vi vidis, eĉ nur ses monatoj komence de nova projekto povas esti tamen eventoplenaj. En dek du daŭrigaj monatoj ankaŭ vi povos helpi por la okazigo de multo plia. Bonan laboron!

Renato Corsetti (Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ✉corsetti@itellcad.it)

HISTORIO

Vigodskij: dokumenteble esperantisto

Movad-historiisto Jean Amoureux alportas atentindan konfirmon pri la esperantisteco de la fama psikologo Lev S. Vigotskij (okt. '97, p. 161).

En la oktobra *Esperanto* mi legis kun intereso la artikolon pri “la Mozarto de psikologio”. Konsultante kaj analizante la ununuran volumon de *Ruslanda adresaro* post 1912, mi povas diri ke ja *Lev Semjonoviĉ Vigodskij sin deklaris esperantisto*.

La koncerna 108-paĝa adresaro estis eldonita de la tiama rusuja motoro de la movado, Librejo Esperanto, kiu i.a. eldonis la renoman kaj historian organon *La Ondo de Esperanto*. La antaŭparolo de la adresaro klarigas ke la

studenta grupo ĉe Moskva Universitato estis komisiita kolekti la adresojn. Ĝi sendis pli ol 20 000 demandfoliojn kun la peto “resendi ilin kun plenaj adresoj al la sendintoj”. Alvenis proksimume 6000 respondoj.

Ni nun iru al la paĝo 48, ĉe la urbonomo Gomel. Ok nomoj estas enskribitaj, laŭ alfabeto ordo, ne kiel delegitoj sed kiel esperantistoj. Tri el la ok nomoj apartenas al la familio Vigodskij. (Ni notu ke en la adresaro la kvina litero estas *d* kaj ne *t*.)

Sine de la familio la ord-enskribo ne plu estas alfabeto. La unue enskribita estas L.S. Vigodskij kun plena adreso. Sekvas s-ino E. Vigodskaja (probable lia patrino) kaj D. Vigodskij, lia kuzo kun — por ambaŭ — la simpla indiko “Sama adreso”.

Konsidere al tio kio estas dirita en la antaŭparolo kaj al la ord-enskribo, tio ŝajnas signifi ke, kiel studento, L.S. Vigodskij iniciatis la respondon al la studenta grupo kun sia plena adreso, altirante la kuzon kaj ne inverse.

Restas la demando: kiugrade L.S. Vigodskij estis esperantisto? En sia referenca *Bibliografio de internacia lingvo* (1929), Petro Stojan citas la nomon de Vigodskij kiel kunlaboranto de *Esperanto*, la oficiala organo de UEA, kaj ni tiurilate menciu la artikolon, ŝajne originalan, kiun li kunverkis pri R. Tagore kaj kiu aperis en 1914 (n-ro 166 [7], 20 apr., p. 102).

En ambaŭ kazoj mankas la antaŭnomo de la kunlaboranto/kunaŭtoro, sed la fakto ke la artikolo aperis en la fako “Socia vivo” de la tiama *Esperanto* povas implice signifi ke ĝi estis el la plumo de Lev Semjonoviĉ.

Jean Amoureux (Francio)

— 48 —

(47.63) Reĉickij uezd.

REĈICKA urbo. Demidenko, I. Z., laboristo, Vokzalnaja str. Mnuhin, N. A. Aleksandrovskaĵa str.

(47.63) Sluckij uezd.

SLUCK, urbo. Jodko, A. Gogolevskaĵa str.

(47.63) MOGILEVSKAJA GUB.

(47.63) Gomelskij uezd.

GOMEL, urbo. Cemah, F., s-ino. Kuzneĉnaja str., 12. Eljaŝev, G. Str. Bar. Nolkien, d. Reŝ. Kaganoviĉ, s-ino, Orlovsk. str. Stradomskaĵa, s-ino. Apteknaja 52. Vigodskij, L. S. Rumjancevskaĵa str., 46, lĝ. 3. Vigodskaja, E., s-ino. Sama adreso. Vigodskij, D. Sama adreso. Zaharin, L. Zamkovaja, 51.

(47.63) Mogilevskij uezd.

MOGILEV, urbo. Gnedovskij, T., stud. Bolŝ. Sadovaja.

Evidente helpi en Albanio

Esti utila al la samhomaranoj kaj helpi la bezonantojn al retrovo de pli bona vidkapablo — ĉi tiujn Zamenhofajn tradiciojn daŭrigas hodiaŭ per sia agado Jacques Tuinder, 65-jara nederlanda esperantisto.

Ĉiu el ni bone scias ke la internacia lingvo bezonas ankaŭ propagandon efikan kaj konkretan por ke ĝi disvastiĝu inter la homoj. Interesa kaj tre fruktodona ĉi-rilate estas la laboro de Jacques Tuinder, nederlandano, kiu multe vojaĝas en diversaj landoj pro la agado de la bonfara fonduso kiun li estras, “Evidente”, kaj havas kontaktojn personajn kun la

loĝantoj de tiuj landoj. Al ĉiuj individuoj kaj aŭtoritatoj li fiere deklaras ke “la lingvo de mia organizaĵo estas Esperanto” kaj ne emas interparoli en alia lingvo krom ĝi. Tiel ekde kvar jaroj li agadas ankaŭ en Albanio, kie lia fonduso starigis optikan klinikon, venigis specialistojn pri oftalmologio por diagnozi kaj helpi per taŭgaj okulvitroj centojn da pacientoj, pre-

cipe etulojn, helpis notinde per materia bazo (hejtosistemo, brajlo-presilo kaj aliaj provizaĵoj) la instituton por nevidantoj en Tirana. Li kontaktis la lokajn esperantistojn, kiuj helpis lin per interpretado en la kunlaboro kun la koncernaj institucioj, inkluzive aŭtoritatojn en la ministerio pri edukado. Ĉiuj koncernuloj eksciis pri nia internacia lingvo kaj praktike ekvidis ĝian taŭgecon por la internacia interkompreniĝo. Dank’ al tio nun en la instituto por blinduloj oni povos ekposedi Esperanton per novaj lernolibroj en brajlo, kiujn pretigos la kunlaboranto de Jacques, Hans Baumann.

La 10-an de januaro Jacques Tuinder fariĝos 65-jara. Mi kaj aliaj albanaj samideanoj deziras al li feliĉon kaj sukceson en lia nobla laboro favore al malriĉaj popoloj kiel tiu albana.

Bardhyl Selimi Mezini (Albanio)



Foto: Franjo Verhey

Centra Renkontejo, sepan fojon

La daŭra sukceso de la Malfermaj Tagoj de la Centra Oficejo — aranĝo lanĉita en 1994 kaj jam tradiciiginta — plu eldevigas ripetadon. La 29-an de novembro, sabate, la Roterdama sidejo de UEA proponis sin jam por la sepa fojo kiel etosplena renkontiĝejo por cento da gastoj — precipe, sed me nur — el la Beneluksaj landoj, el Germanio kaj Francio.

Paul Gubbins, la scenaristo de la televida kurso *Esperanto, pasporto al la tuta mondo* (vd. okt., p. 171) pre-

zentis ĝin eĉ tri fojojn, bilde kaj parole. Ankaŭ la alia honora gastu preleginta, d-ro Marc van Oostendorp, estas jam konata al la legantoj de ĉi tiu revuo (nov., p. 181). Sur la foto li babilas (dekstre) kun Edwin Burg el Hago.

La gastoj svarmis precipe en la Libroservo, kiu ofertis ĉiujn siajn varojn kun 10%-a rabato kaj debitis siajn titolojn je preskaŭ sep mil guldenoj en sep horoj. Kiel varmaj bulkoj vendiĝis precipe la nova Auld-volumo *Pajleroj kaj stoploj* kaj la Unesko-broŝuro *Tekniko kaj kulturo*, ambaŭ ink-odoraj pro freŝa preso.

La sekva Malferma Tago de la CO okazos la 25-an de aprilo, kun eĉ pli riĉa programo, feste al la 90-jariĝo de UEA.

Ankaŭ mi volas

aboni en 1998 al

EVENTOJ!

Baza kotizo: 74 NLG, aerpoŝte: 86 NLG

Kulturaj konkursoj de TEJO

TEJO lanĉas kulturajn konkursojn en kvar kategorioj por la jaroj 1998 kaj 1999.

La unua kategorio, desegnado, celas infanojn malpli aĝajn ol 15 jaroj (ne nur esperantistajn). Limdatoj: 30 apr. 1998 kaj 1999. Due, temas pri satiroj (limdato: 31 okt. 1998); trie, pri komiksoj kaj bildstrioj (30 apr. 1999), kaj kvare pri videofilmoj (31 okt. 1999), ĉi lasta ankaŭ por ne-esperantistoj.

La allogaj premioj inkluzivas monsumojn, bildstriojn, kompaktnajn diskojn kaj librojn. Post la unua konkurs-periodo TEJO intencas eldoni libron kaj videofilmon kun la premiitaj verkoj.

Pli detalaj informoj:

Miquel Gomez i Besòs

Vicprezidanto de TEJO

respondeca pri kongresoj,

seminarioj kaj kulturo

Nideggerstr. 9

DE-50937 Köln, Germanio

☐Tejo_Officejo@bn.maus.de

Malstreĉi la atmosferon

Post dutaga tutlanda esperantista renkontiĝo (8-9 nov.) en la sud-pollanda urbo Gliwice samloke sekvis raporta-elekta konferenco de Pola Esperanto-Asocio (10-11 nov.)

En la unua partoprenis ĉ. 80 personoj el Pollando, Ĉeĥio, Germanio, Aŭstrio. Inter la prelegantoj estis Zofia Banet-Fornalowa, pri Janusz Korczak (pola kuracisto kaj prizorganto de orfaj infanoj) kaj liaj rilatoj kun kelkaj familianoj de Zamenhof; Antoni Tabacki, pri metodikaj demandoj; kaj Andrzej Petty, kiu parolis — krom pri la Adelajda UK — pri la celoj kaj signifo de Kampanjo 2000, kun aparta konsidero al la neceso ellabori en Pollando propran landskalan agadprogramon.

Unu konferenca kunveno, gvidata de pastro Jozef Zielonka, estis dediĉita al Esperanto kaj ekumenismo. Ankaŭ lokaj katolikoj povis aŭdi Esperanton, ĉar — kadre de kutima dimanĉa meso — diservo estis kuncelebrata de tri pastroj konantaj Esperanton. La tekstojn de la kantoj oni projekciis sur granda ekrano nur en Esperanto, kio ebligis la kunkantadon eĉ al neesperantistoj, ĉar unu el la pastroj meze de la meso informis pri la ĉefaj reguloj de la prononcado kaj alvokis kunkanti.

Pri la konferenco vaste raportis lokaj amaskomunikiloj kaj eĉ du tutlandaj televid-stacioj en siaj novaĵ-programoj.

Nova estraro de Pola E-Asocio

En iom streĉa atmosfero komenciĝis la konferenco de Pola Esperanto-Asocio. La prezentita estrara raporto ne plaĉis al la delegitoj. Oni postulis multajn klarigojn, speciale pri financo, kiujn la eksiganta estraro ne povis doni tuj. Post treege vigla diskutado oni decidis ne doni malŝarĝon al la eksiganta prezidanto Jeremiasz Ratajczyk, nek al Zygmunt Nagaj, Ryszard Rokicki, Krzysztof Śliwiński kaj Wojciech Soczówka. Ĉi-lastan aparte forte kritikis la ĉefa kontrol-komisiono. Plenan fidon oni esprimis al Stanisław Mandrak, Ewa Misior, Jan Książek kaj J. Turowska.

Por la posteno de prezidanto la unusola kandidato estis Stanisław Mandrak (str. Kormoranów 39/16,

PL-44-114 Gliwice; staman@privonet.pl), estro de la PEA-Filio en Gliwice, kiu ricevis centprocentan subtenon. En la nova estraro troviĝas krome i.a. Aleksandr Zdechlik el Gliwice, Ewa Misior kaj Lech Piotrowski el Varsovio, kaj Stanisław Gonczaruk el Szczecin. Oni decidis transloki la sidejon de PEA al Gliwice, kion fiksas tuj poste la nova, plene

akceptita statuto de PEA, kies ĉefaj trajtoj estas malcentrado kaj senbalastigo de la strukturoj.

Rezulte de vigla diskutado pri la estonteco de PEA, oni decidis doni pli da atento al interna kaj ekstera informado, plintimigo de inter-filia kunlaboro, vastigo de la instruado, kaj ellaboro de programo pri la partopreno de PEA kaj polaj esperantistoj en Kampanjo 2000. El la diskutado montriĝis ke, kvankam la ĉefa estraro de PEA en la lastaj tri jaroj evidente dormis kaj faris nenion, lokaj grupoj agis laŭ sia eblo kaj aktivis diverse maniere, ekz. en Olsztyn (turismaj

Esperanto-Centro Bjalistoka

La jam funkcia informcentro Zamenhof (vd. dec. '96, p. 202) oficiale fariĝas Esperanto-Centro Ludoviko Zamenhof, laŭ decido de la konsilantaro de Fondumo Zamenhof.

Post la registrado de sia statuto en aprilo, unuafoje kunsidis, la 8-an de novembro en Bjalistoko, la konsilantaro de Fondumo Zamenhof. Dum la kunsido oni pritaksis la agadon de la Fondumo inter decembro 1995 kaj oktobro 1997, kaj estis elektita kvin-persona estraro. La konsilantaranoj alprenis du gravajn decidojn: pri fondo de Esperanto-Centro en Bjalistoko kaj pri rekonstruo de la Zamenhofa naskiĝdomo.

La konsilantaron konsistigas: Stanisław Dobrowolski (prezidanto de Bjalistoka Esperanto-Societo), prof. Hanna Konopka (Universitato en Bjalistoko), Krzysztof Jurgiel (la urbestro de Bjalistoko), Marija Belošević (sekretario de ILEI), reprezentanto de Pola Esperanto-Asocio (vakas), Roman Dobrzyński (UEA), Barbara Despiney (TEJO) kaj Kazimierz Derkowski (Bjalistoka vojevodio oficejo). Kiel prezidanton de la konsilantaro oni



La naskiĝ-domo de Zamenhof en 1912 – laŭ decido rekonstruota.

konferencoj “Freŝo”), Koszalin (feri-
ado “Balta Printempo en Mielno”),
Lodzo (libroeldonado), Gliwice (kur-
soj, konferencoj, ekstera informado)
ktp. Oni konstatis ke Pola Esperanto-
Asocio post la lanĉo de la merkato-
mekanismoj en Pollando ne sukcesis
sin tuj adapti al la novaj cirkonstancoj,
kaj tio kaŭzis multajn organizajn kaj
financajn perdojn. Sed nun iom post
iom la situacio ŝanĝiĝas, kaj oni kom-
prenas ke finiĝis la epoko de la sub-
venciado de la Esperanto-movado fare
de la kulturministerio kaj lokaj sindi-
kataj organizaĵoj.

Andrzej Pettyn (Pollando)

elektis Derkowski; vicprezidas Dob-
rzyński. La estraro de la Fondumo kon-
sistas el prezidantino Hanna Konop-
ka, sekretario Jarosław Parzyszek, es-
traranoj Stanisław Dobrowolski, Wa-
lentyna Fiszer-Dolińska kaj Andrzej
Zejdler.

Laŭ propono de Bjalistoka Espe-
ranto-Societo, la estraro rezoluciis
fundi Esperanto-Centron Ludoviko
Zamenhof — kiu estu studejo kaj sti-
mulejo de Esperanto kaj de internacia
scienca, eduka, kultura kaj turisma
interŝanĝo. La provizora sidejo de la
Esperanto-Centro identas kun tiu de
Fondumo Zamenhof (strato Piękna 3,
Bjalistoko).

La estraro decidis subteni la inici-
aton rekonstrui la naskiĝdomon de
Zamenhof, kiu servos kiel sidejo de la
Esperanto-Centro, Zamenhof-muzeo
kaj aliaj organizaĵoj.

Andrzej Zejdler (Fondumo Zamenhof)

Por konstanta ekspozicio

La Esperanto-Centro Zamenhof (ul.
Piękna 3, PL-15-282 Białystok, Pol-
lando; ☎/☎+48/85/454-600; ✉f-
zamenhof@centrumtur.sitech.pl)
organizas por 1998, kunlabore kun
la Regiona Muzeo en Bjalistoko,
migrantan ekspozicion pri Espe-
ranto kaj Zamenhof, kiu estos
montrata en diversaj muzeoj kaj
lernejoj, kiuj post 15 decembro 1998
iĝos la konstanta ekspozicio de la
Centro. Ĉia helpo pri ekspozitaĵoj
estas bonvena.

Reagoj



Ankaŭ Kanado afiŝis

L. Szilvási raportis pri lerneja
afiŝo-kampanjo en Hungario (nov.,
p. 192). Estas interese noti ke simil-
ampleksaj kampanjoj jam okazis
ankaŭ en aliaj landoj. En Kanado,
ekzemple, oni dum la jaro antaŭ la
69-a UK en Vankuvero (1984) sen-
dis al centoj da lernejoj afiŝojn por
reklami perpoŝtan Esperanto-kurson.
Antaŭ tri jaroj, kadre de simil-gran-
da kampanjo, Kanada Esperanto-
Asocio sendis al ĉiuj anglalingvaj
publikaj bibliotekoj de Kanado (pli
ol 2000) inform-pakaĵojn kaj inviton
al senpaga abono de nia anglalingva
novaĵletero.

La lerneja inform-kampanjo de
1984 trovis bonan respondon (kvan-
kam eble ne tiel bonan kiel la hun-
gara — Esperanto ja ne havas tiom
da socia rekono en nia lando kiel en
Hungario), sed la reago al nia bibli-
oteka kampanjo de 1993/94 estis,
verdire, nekontentiga.

Paul Hopkins (Kanado)

Senceremonie

Mi legis la ideon (jul.-aŭg., p. 123)
pri “dulingva ceremonio kiel ponto
inter la ‘kongreso’ en Esperanto kaj
la nacilingva ‘konferenco’”, aranĝo
“kiu devos fariĝi normalaĵo de la
‘post-Praga’ movado”. Laŭ mi, ne ĉi-
tia lingva ceremonio estas bezonata,
sed konstanta uzo de nia lingvo kaj
multe pli da bonaj instruistoj, ĉar
sen tio nia movado ne progresos.

Lilia Fabretto (Italio)

Diana

La mondo bezonas multajn per-
sonojn similajn al Lady Diana. Ŝi
luktis por la nuligo kaj forigo de la
kontraŭ-personaj minoj. Tiuj ĉi kru-
ele kaj definitive frakasas la kruojn
de multaj infanoj.

Ĉu ne estus dezirinde ke, per sia
internacia lingvo, ankaŭ esperan-
tistoj kontribuu al la eliminado de la
ekzistantaj kontraŭ-personaj minoj
kaj al tuta ĉeso de ilia produktado?

Louis Bourdon (Francio)

Senaga Tago

Kvankam nekompleta, la rapor-
taro pri la Ago-Tago (*Influo* 15,
nov., p. 192) aspektas ja impone.
Por mi persone tiu tago estis unu el
tiuj malmultaj kiujn mi povas ĝui
ekster Esperantio.

Jam pli ol 40-jara, kun grizaj har-
aro kaj barbo, obstina senkravatulo,
mi estus maltaŭga, malalloga, mal-
utila reklamanto de Esperanto en
mia regiono, se enkalkuli la suges-
tojn de la ĉioscia Bernard Golden
(*Influo* 14, jul.-aŭg., p. 131). Sekve,
por ne malhelpi, mi nenion faris por
Esperanto dum la ĉi-jara Ago-Tago.
Ankaŭ la aliaj membroj de nia Espe-
ranto-grupo (ĉiuj malpli junaj ol mi)
faris nenion publikan por Esperanto
dum la Ago-Tago ĉi-jara, manke de
atentokaptaj minijupulinoj.

Pro tiu Senaga Tago, ni ĉiuj de-
vas esti dankaj al Bernard Golden.
Ju pli multe li ofendas nin, des pli
multe da liberaj, senagaj tagoj ni
havos. Ni ankaŭ esperas ke *Influo*
kaj la revuo *Esperanto* ne ĉesos helpi
nin ĉi-direkte.

Ionel Oneț (Usono)

Pen-rin-doj-drajt

“Kial strato nomita laŭ la bopatro
de Zamenhof troviĝas ĝuste en la
nordkimra vilaĝo Penrhyndeudraeth
(por la prononco konsultu la antaŭ-
an prezidanton de UEA)?” — deman-
das Ulrich Lins (majo, p. 92).

Multaj el ni bone scias ke la bo-
patro de Zamenhof ebligis la eldo-
non de la Unua Libro, kaj ke sen tiu
helpo la eldono neniam okazus aŭ
estus almenaŭ prokrastita. Tial la
nomo Silbernik meritas lokon en nia
historio.

Pri la ĝusta prononado ne necesas
konsulti John Wells. Simple: “pen-
rin-doj-drajt”. Laŭ onidiro, la vorto
signifas: “la kapo de la tero kiu ku-
ŝas inter du riveroj”, aŭ eĉ “inter du
plaĝoj”.

*C. A. Shrives (“Voĵfino”,
Silbernik Placo, Penrhyndeudraeth,
Gwynedd, Britio)*

Alispeca turismado en Kubo

En favorprezaj ofertoj de vojaĝ-agentoj pli kaj pli aperas Kubo. Sed ... temas pri tranokto en hoteloj, kaj se vi ne parolas la hispanan, vi povos nur gestumi kun la kubanoj. Per Esperanto eblas tute alispeca turismado — rakontas spertinto.

Mi estis la lastan someron unu el la unuaj esperantistoj kiuj uzis la nove starigitan turisman reton de Kuba Esperanto-Asocio (KEA) por esperantistoj en Kubo.

Jen kiel okazis. Mi pasigis unue du semajnojn en Havano, loĝante en la sidejo de KEA kaj mangante plejparte tie kun eŭropaj lingvolernantoj. Mi partoprenis en la unua semajno du tagojn de Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko: tie mi trafis multajn interesajn homojn, kiuj dum la dua semajno konatigis al

ni atingis Sancti Spiritus, trajnis nokte al Cienfuegos, poste per la plej aĉa trajno kiun mi iam en mia vivo uzis — sed ankaŭ tio estas memoraĵo iel al mi kara — al Santo Domingo, kie akceptis nin ĉe la kajo tuta klaso da gejunuloj kun sia E-instruisto. Kaj tiel longe plu, revene al Havano.

Mi loĝis senescepte ĉe familioj de esperantistoj, kie mi kaj mia akompanantino estis akceptataj kun eksterordinara gastamo, kun kortuŝa amikeco. Ĉar la vivo en Kubo estas en tiu ĉi “speciala periodo” (la usona blokado)

tute male al niaj eŭropaj spertoj! Esperanto estas en Kubo movado de junuloj. Kaj en kiaj kondiĉoj ili lernas! Plej ofte tute sen helpiloj, kaj foje eĉ la instruisto mem ne havas lernolibron nek taŭgan vortaron.

En tiu situacio duoble valoras se la urbaj bibliotekoj (tie ja okazas la E-kursoj en pluraj lokoj) havas kelkajn librojn en Esperanto. Donacita vortaro aŭ lernolibro estus certe ĝoje metata sur facile alireblan breton, kaj multaj venus pasigi sian libertempon ĝuste tie por lerni nian lingvon kaj perfektigi en ĝi. Se vi turismos en Kubo, nepre kunprenu almenaŭ unu-du volumojn de *Plena Vortaro*, aŭ ion alian utilan, donace al urba biblioteko. Se vi ne intencas al-kubiĝi, pensu tamen ke apenaŭ eblas pli efike donaci libron ol al urba biblioteko en Kubo! Konsilindas tamen ne poŝti la librojn sed alporti persone. Mi pretas peri tiakaze.

Esperanta turisto, alveninte Havanon, preparas kun KEA-respondeculoj sian vojaĝprogramon. Li elektas la urbojn vizitotajn kaj ĉion ceteran: vidindaĵojn vizitotajn, Esperantajn eminentulojn renkontotajn, kulturajn aranĝojn aŭ karnavalon, kurson pri dancado aŭ alian hobion, ktp ktp.

Kiu sezono plej taŭgas por vizito al Kubo? La tuta jaro. Tamen estas individuaj preferoj: la “vintra” duonjaro estas pli seka kaj malpli varma, la somera pli varma, sed okazas refreŝigaj pluvoj.

Vojaĝagentoj ofertas ege malaltpreze organizitajn vojaĝojn al Kubo. Konsilindas kompari tiujn ofertojn kun simpla flugo kaj reflugo. Povas ja okazi ke unusemajna restado en Varadero, kompleta kun flugo tien kaj reen, kostas nur ridinde pli ol nura flugo dudirekta. Tiukaze konsideru la eblon mendi unu tian semajnon (ekz. en Varadero) kaj resti — por dudeko da dolaroj po tago — kromajn tri semajnojn en Kubo: pere de Kuba E-Asocio kaj la turisma Esperanto-reto!

Kontaktu: Alberto G. Rodríguez Pineda, Kuba Esperanto-Asocio, Apartado 5120, CU-10500 La Habana; ☎+53/7/404-484; ☎338-729; ✉kubesp@mail.infocom.etecsa.cu.

Vilhelmo Lutermano (Francio)



Kuru al Kubo (rapide kiel la fama kuba maratonulo Juantorena, la dua kuranto de dekstre) — kie atendas vin pli ol ŝablona plaĝoturismo.



Foto: Caribbean's Color

mi la ĉefurbon kaj iom da ĝia vivo.

Dum tiu dua semajno ni decidis ĉe KEA pri la vojaĝprogramo kaj pri persono akompananta min. Dum la vojaĝo ni uzis ĉiajn veturilojn, laŭ kuba maniero: unue fluge al la plej orienta urbo, Guantánamo, de tie per taksio al Baracoa kaj revene, kaj plu al Santiago. “Speciala trajno” — komforta, klimatizita, rapida, sed por usonaj dolaroj — portis nin al Camagüey, poste “normala” trajno al Morón: vagonaro malrapida, ne malkomforta, sed sen klimatizilo. De tie per diversaj busoj — jam por sukcesi eniri buson oni bezonas spertan akompananton —

malfacila, la gasto kompreneble zorgas pri la monaj rimedoj por la tutfamiliaj manĝoj. La gasto ricevas ĉie apartan ĉambron kun komforta lito.

Tiu mia vojaĝo tra-kuba (de Havano al Havano) daŭris tri semajnojn — kio ŝajnis minimuma tempo. Kvankam mi vojaĝis per Esperanto en multaj landoj, neniam en mia okjara esperantisteco mi renkontis tiom da interesaj kaj amindaj homoj en tiom mallonga tempo. Mi ĉeestis Esperanto-lecionojn kaj miris kiel multaj homoj lernas nian lingvon: preskaŭ senescepte junuloj,

Stafeto tra tempoj kaj lingvoj

Antaŭ kvindek da jaroj aperis en la ĉeĥa lingvo rimarkinda libro, kies posta Esperanta eldono (*La alaska stafeto*) rezervis surprizojn al la aŭtoro František Omelka. La sama verko lastatempe ŝanĝis la vivon de ĉeĥa familio en Alasko — rakontas Jan Werner.

En unu urbeto infanoj ekmalsanis pro difterio. Por savi ilin kuracisto bezonis 400 gramojn da serumo. Sed kiel alporti la medikamenton en lokon kiu estas kelkcent kilometrojn distanca de la plej proksima urbo? La vojo al ĝi estas vojo de morto.



Foto: Nordmarne-Forbundet

“Leonard Seppala ankoraŭ vivas.”

Kelkaj viroj decidiĝis por la heroo faro. Ili preparis sledojn, jungis hundojn, prizorgis la serumon kaj organizis stafeton kian la mondo ankoraŭ ne vidis. Ili ekveturis kaj la telefonanonco flugis antaŭ ili. Ĝi ne estis nur anonco, ĝi estis ordono. La homeco ordonis kaj ne ordonis vane. Ĉie atendis preparitaj viroj kaj hundoj. La paketo portigis de mano al mano. Eĉ minuto ne perdiĝis. La plej malfacilan vojsparton entreprenis finno Seppala. Tondris kaj estis terura neĝventego. Kun ĝi luktis unusola viro kun 12 hundoj. La celon li atingis. Transdonis la paketon, ĵetis al la hundoj fiŝojn kaj falis sur la sledon. Longe daŭris ĝis oni lin vekis. Dume jam la lasta viro estis enveturanta en la malfeliĉan urbeton kaj la kuracisto kuris al li renkonte. La infanoj estis savitaj.

Tio estis ekzemploteksto en lernolibro pri stilo kiun legis en sia liber-tempo, en la jaro 1938, la ĉeĥa esperantisto František Omelka. La mallonga artikolo vekis ĉe Omelka atenton. La sorto de la alaska urbeto kaj la heroeco de la bravaj savintoj elvokis en li profundan senton, kiu iom-post-iome ŝanĝiĝis al intenco verki rakonton pri la okazintaĵo. Sed la konciza informo en la lernolibro estis por tio nesufiĉa. Kie precize la urbeto situas? Kiun nomon ĝi havas? Kiel nomiĝis la kuracisto kaj la partoprenintoj de la stafeto?

Omelka ne sciis la anglan lingvon, sed el malnova jarlibro de Esperanto-asocio li elserĉis adresojn de esperantistoj en Kanado kaj Usono kaj skribis al ili samtekstan leteron, petante la bezonatajn informojn. Li ricevis respondon de profesoro en Vankuvero, kies studento Jack Scrivener sciis Esperanton kaj plenumis la tutan aferon. Li trarigardis malnovajn gazetojn, tradukis Esperanten la plej gravajn artikolojn pri la stafeto, kaj sendis ilin al Ĉeĥoslovakio, kun granda mapo de Kanado kaj Alasko, kaj propra desegnaĵo de Alasko en kiu estis markita la itinero de la stafeta ĉeno en 1925.

Tiu korespondo okazis antaŭ la komenco de la dua mondmilito. Dum

la milita furiozo estiĝadis la Omelka prozo pri la alaska stafeto. La nazioj estis likvidantaj milionojn da homoj, dum la malhezitemaj viroj en la libro de Omelka homojn savis. Kun netoleremo de la nazioj kontrastis solidareco de ordinara homoj de malproksima Nordo. *Stafeto* de Omelka tiel elkreskadis ne nur el la materialo de Scrivener, sed ne lastvice el la tempo kontraŭ kiu ĝi protestis per sia humanisma patoso.

Post la milito, en 1946, la libro aperis en la ĉeĥa. Nelonge poste ĝi atingis ankaŭ alilandajn legantojn. La Esperanta versio aperis, kiel rerakonto fare de la aŭtoro, felietone en *Esperanto* tra 1951, kaj kiel libro en 1952 en Anglio. Je granda surprizo de Omelka, ĉi ties kovrilo surhavis foton de viro kun du hundoj, kaj la vortojn: “Leonard Seppala ankoraŭ vivas”. Omelka eksciis de la eldoninto ke Seppala, kies foton tiu ricevis de finna leganto, vivas en Usono.

Denove sekvis letero, kiu kun la Esperanta *Stafeto* direktiĝis trans la oceanon. Leonard Seppala, jam 80-jara, tradukigis la libron al la angla lingvo kaj en letero al Omelka esprimis sian miron pri la fidela priskribo de la alaska okazintaĵo fare de ĉeĥa

Stafeto al feliĉo

Unu mia konato, instruistino, ĉiujare invitas min kaj mian edzinon pasigi kelkajn libertempajn tagojn en ŝia somera vilao. Tie ni babilas pri diversaj interesaj. Tiel ni eksciis ke konatoj de ies konatoj el Ĉeĥio, probable politikaj elmigrintoj, pelataj de sorto kaj hazardo, ekloĝis en la urbeto Nome en Alasko. Ili skribis hejmen ke ili fartas malbone, ke la loko estas la ekstremo de la mondo, neniun ili tie konas, la lokaj loĝantoj ilin konsideras venintoj el “kiu-scias-de-kie” kaj lasas ilin izolaj.

Nia konata instruistino estas agopreta virino. Konante la libron *Stafeto*, ŝi vizitis la familion de Omelka

kaj demande kontrolis ĉu la okazintaĵo tie priskribita estas vera. Poste ŝi sendis la ĉeĥlingvan *Stafeto* al la ĉeĥa familio en Alasko. La familio neniam aŭdis pri la libro, tralegis ĝin kun avida intereso, montris al iu kaj koncize tradukis. Kelkaj loĝantoj de Nome sciis pri la okazintaĵo, aŭdiĝis eĉ kelkaj maljunaj atestantoj de la epidemio kaj de la savstafeto. Ĉiu miris ke pri ili, ilia urbo kaj ilia malnova afero antaŭ multaj jaroj aperis tuta libro ie en Eŭropo. La feliĉa fino maniĝiĝis — preskaŭ ĉiuj en la urbo Nome scias pri la ĉeĥa familio kaj konas la familianojn, kiuj nun estas ŝatataj kaj popularaj ĉie kien ili venas, kaj estas feliĉaj.

jw

✎ aŭtoro. Li modeste aldonis ke en la stafeto ne temis pri ia heroeco, ĉar da similaj veturoj li entreprenis tutan vicon.

Plia surprizo okazis en la jaro 1958. Omelka tiam ricevis leteron de Arthur Werner, kiu tradukis *Stafeto* en la germanan lingvon. Li skribis ke el malnova germana ĵurnalo li eksciis la

nomon de tiu stafetano kies nomon Scrivener ne sukcesis trovi: li estis ruso Pavel Ivanov. La identecon de Ivanov atestis ankaŭ Leonard Seppala, kiu plue skribis ke Ivanov antaŭ kelkaj jaroj el Alasko forveturis ien en Sovet-union. Omelka por si fiksas novan taskon: elserĉi kie Pavel Ivanov vivas kaj informiĝi ĉe li pri detaloj de lia

stafeta veturo. Sed sian taskon la verkinto jam ne povis plenumi, ĉar li mortis en junio 1960.

La espero ke iu malkovros Pavel Ivanov estas tre malgranda, sed ebla ĝi estas.

*Laŭ traduko de Jan Werner (Ĉeĥio)
el postparolo de František Všetíčka
al La alaska stafeto*

Forumo



Malgrimpi de niaj retorikoj



De longe ĉesis provoj “porparoli” en Esperanto ian “triamondan” parolantaron. Eble feliĉe, la Esperanto-partoprenaj triamondanoj vere ne formis apartan getton ene de movado kiu eĉ sen tio montras foje priveinde gettan karakteron. Tamen, oni eble bedaŭru ke triamondaj voĉoj ne sufiĉe ofte atentigas nin ke siatempe la movado pretis trudi verdan “solvon” sen diskuta partopreno de la sudaj popoloj.

Oni pretis trairi la decido-“rajton” de la koloniaj potencoj, laŭeble uzonte ekzemple la Ligon de Nacioj por trafi demorgaŭe devigan lernejadon de la lingvo. Kiam la mondo devigis al tiuj nordaj potencoj retiron de siaj amaj tentakloj disde la sudo, la movado — kiu evidente imitas kaj ne gvidas la mondon pri tiaj egalaj kaj malegalaj inter gentoj — sekvis la novajn retorikajn modojn. Lapenna do povis dum la Haga kongreso en 1964 privei la elspezon por la tradukoj en UN kaj demandi sin ĉu ne estus pli bone transiri al Esperanto kaj la tiel ŝparitan monon doni al “landoj malsatantaj en Azio kaj Afriko”. Eŭropaj esperantistaj voĉoj pli nuntempaj eble ĉesis elkrii tiel “malpraktikajn, nevendeblajn” celojn. Sed mi ne vidis indikojn ke inter la nunaj voĉdonantoj en la norda Esperantujo ĝeneraliĝis malplia

analfabeteco pri la imperiisma enhavo de la tiel proponita “helpo” al bezonaj landoj.

Mi kredas ke venis la tempo por formuli pli ĝeneralan movadan imperativon, en la formo de demando: kiamaniere ni malgrimpu de sur la retoriko-montoj kie ni foje kaptilas nin?

Precipe tiun demandon mi volis komuniki al vi. Vi do eble permesos al mi iom rapidan skizon de eblaj responderoj. Retoriko estas finfine parolilaro kaj ne pensaro sentate vera (restipova, modifo-malbezona). Oni ilizas siajn parolojn por povi trafi, venki, gajni ion. Ne mirinde do ke ni mobilizas de tempo al tempo diversajn retorikojn, se ni celas iel-tiel ĝisbatali ĝis niaj publikoj — per la rekta persvado, se eble, sed eĉ pere de la registoj (aŭ, ekzemplo ekstrema, la koloniaj regolandoj) devigontaj aplikigon de niaj proponoj, se necese.

Multaj komentantoj notis ke ni kiel komunumo jam eksigas tiun Aliron al la publiko. Ni transhumoriĝas al... Alstaro. Tiu humoro igas niajn starojn pli gravaj ol, aŭ almenaŭ klarigendaj antaŭ, niaj iroj. Mi volus apudnoti ke tiu nia alstaro donvas novan stelecon al pli da ideaj iniciatoj. Tial, ekzemple, tiom da universitataj aŭ tiutendencaj proponoj kaj kritikoj.

Estas utile emfazi tiun alistiliĝon kiel indikon de nia kreskanta kompreno ke ne per rekta militado aŭ nerekte tiutipaj strategioj ni volas — eĉ se ni povus — atingi la celon en gloro. Lapenna tiurilate tre utile em-


fazis la universitatajn kaj ideajn forumojn. Ekde la apero de voĉoj “etnismaj”, “mediismaj”, “inismaj”, malgraŭ la neapero de specifa sudismo, ni havas bazon por intertrakti kun la nuntempaj idearoj pri diversaj luktantaroj nepovontaj formiliti malamikojn sed nove kapablaj alikulturigi la arenon mem kaj for-malmiliti la malamikecojn. Taŭge al nia nova rolo de studentoj kaj studigantoj, ni certe volos alporti specifan kontribuon al tiuj idearoj el vidpunkto de lingva movado.

En tiu kunteksto, gravas la pensa prilaboro de pontiloj inter studoj de la lingvo Esperanto en kiu oni alstrebas kaj pripensas la espriman (kaj tradukan, reespriman) simplon — kaj studoj de ĝia kultura komunumo kiu alstrebas la intergastigan simplon sur planeda mapo rifuzanta “moderne” specifi la gastojn kaj gastigantojn laŭ bona, nacia, aparteno. Ponti inter tiuj studaroj signifos eksplaciti la liberecon de la parolanta homo disde la parolejaj (parlamentaj) konceptoj de bieneskaj posedantaroj (respublikoj). Tiun liberecon plej emfaze prezentas la postmoderna klavoj kiujn tuŝis en ĉi tiu revuo Mark Fettes (nov., p. 182). Frapis min la parenceco inter tiuj kaj la bienkritikaj iloj je la dispono de nia nova institucia rimedulo en Amsterdamo, nia genera gramatikisto Marc van Oostendorp (nov., p. 181), kiu peras al ni la rifuzon de la nunaj gramatikoj strukturisme paŭsi la bienarajn mapojn de iaj hereditaj “lingvoj”. Estus sencece voli trudi tiun aŭ alian legon de tia parenceco. Dum la kunlaboroj kiuj nun ekas aperos la klavoj vere kaj sentrude kunludeblaj.

Evidente, se ĉiu heroo volos diste fride soli sur sia atingita monto farita el roke firma retoriko, ne eblos tiaj kunlaboroj. Ni do komencu percepti la proprajn interesojn, kiuj igas la malgrimpon vivnecesa.

Probal Daŝgupto (Bharato)

Kial usonano uzas Esperanton?



Nove renkonti-
toj foje esprimas
surprizon kiam
ili ekscias ke mi,
usonano, uzas
Esperanton an-
stataŭ la anglan
en Japanio. Foje
oni eĉ ne kredas

ke mi efektive estas usonano, ĉar ili aŭdis min paroli nur Esperanton.

Nu, estas vere ke la plimulto el la usonanoj preferas uzi la anglan. Multaj usonanoj opinias ke la angla sufiĉas, kaj ke ĉiu en la mondo devus lerni ĝin. Kial do mi preferas uzi Esperanton por komuniki kun neusonanoj? Jen kelkaj kialoj:

★ **Amikeco.** Dum longaj vojaĝoj mi rimarkis ke la plimulto el la homoj kiuj alparolis min per la angla, ne interesiĝis pri mi kiel homo, nek pri mia kulturo. Ili interesiĝis unuavice pri mono. Aŭ ili volis vendi ion al mi, aŭ ili volis lerni la anglan de mi, por povi ricevi pli bonan edukon kaj pli altsalajran postenon, aŭ ion alian. Kontraste, granda procento de la homoj kun kiuj mi parolas Esperante, interesiĝas pri mi kiel homo, aŭ pri mia kulturo. Multaj el ili deziras amikiĝi, kaj efektive multaj el ili fariĝas amikoj.

★ **Egaleco.** Se mi parolas angle kun japano aŭ iu alia kies denaska lingvo ne estas angla, mi ĉiam, nepre, havas la pozicion de spertulo pri la lingvo, kaj, negrave kiom multe tiu alia persono studis la anglan, li aŭ ŝi nepre parolas el malpli alta pozicio, kiel lernanto al instruisto aŭ subulo al estro. Se anstataŭe ni interparolus per la lingvo de mia kunparolanto, ekzemple la japana, la situacio estus sama sed inversa. Tia malegaleco tre malhelpas la interamikiĝon.

★ **Pordmalfermo.** Dum mia longa mondvojaĝo, Esperanto malfermis multegajn pordojn al mi, figure kaj laŭvorte. Mi tranokte gastis en 150 hejmoj de esperantistoj dum la trijara vojaĝo, kaj nur unu nokton mi pagis en hotelo! Pere de Esperanto kaj esperantistoj, mi povis ĝui tre riĉan kulturon, renkonti multajn diversajn homojn kaj konatiĝi intime kun iliaj vivoj, kulturoj, hejmoj, pensoj ktp.

Kelkaj el miaj bonaj amikoj, post jaroj da amikeco, konfesis al mi ke, antaŭ ol renkonti min, ili malŝatis usonanojn.

Do, se mi uzus la anglan, mi certe ne povus ekamikiĝi kun tiuj homoj, kiuj nun estas tre karaj amikoj. Esperanto ja malfermis la pordon al ili.

★ **Helpi la mondon.** Laborante por disvastigi Esperanton, mi havas la senton ke mi faras ion utilan al la mondo. Se homoj tra la mondo povos libere interkomuniki kiel egaluloj, kaj interamikiĝi per Esperanto, certe la mondo fariĝos pli bona, pli justa, pli simpatia. Mi ne imagas ke Esperanto sola solvos ĉiajn mondproblemojn, sed ĝi ja povas helpi la homojn ellabori solvojn.

★ **Kreemo.** Mi tre amas uzi Esperanton, ĉar ĝi kondukas al plia kreemo. Pro la granda fleksebleco en la lingvo, mi sentas liberigon verkante aŭ parolante en Esperanto kompare kun la angla, kies strukturo kaj vortostoko estas relative fiksataj. La ebloj krei novajn esprimojn en Esperanto estas preskaŭ senlimaj; estas granda ĝojo esplori ilin, kaj trovi trafajn esprimojn, uzante jam ekzistantajn erojn.

★ **Valoraj spertoj kaj memfido.** Trairante pordojn malfermitajn per Esperanto, mi ricevis multajn valorajn vivspertojn kiujn mi ne facile povus havi sen Esperanto. Tiaj riĉaj vivspertoj

multe kontribuis al mia memfido, kaj preparis min pli kompetente agadi en la mondo.

★ **Nova mondkoncepto.** Eble la plej grava profito kiun mi ricevis el mia uzado de Esperanto, estas drasta ŝanĝo de mia mondkoncepto. Antaŭe mi imagis ke la mondo plenas je fremduloj — homoj tre malsamaj kaj ne alireblaj. Kun “fremduloj” oni ne povas multe simpatii, ĉar ili ja estas fremdaj, ĉu ne?

Tamen, pro miaj travivaĵoj uzante Esperanton, mi malkovris ke tiu imago estis tre erara. La mondo plenas ne je fremduloj, sed je homoj, samaj kiel mi kaj miaj familianoj. Kaj plue, tre multaj el tiuj homoj deziras estis miaj amikoj, se ili havas la okazon renkontiĝi kaj konatiĝi kun mi. Do, ili estas ne fremduloj, sed amikoj aŭ estontaj amikoj.

Kia granda diferenco! Nun mi sentas min reale ligita al homoj tra la mondo. Kaj mi ne plu sentas min katenita al nur unu parto de la mondo, al nur unu lingvo, nur unu kulturo. Mi estas libera interagi kun homoj tra la mondo, ĉar ĉie troviĝas amikemaj homoj, kaj ĉar Esperanto donas al mi la rimedon facile interparoli kun ili.

*Joel Brozovsky (Usono/Japanio)
El la revuo Nova Vojo de Oomoto*

Dumvivaj avantaĝoj



Ĉiuj miaj tri infanoj estas dumvivaj membroj de UEA (kaj de la landa asocio). Tio havas jenajn avantaĝojn:

1. Pagi kotizon al Societo

Zamenhof ĉiun jaron estas peza ŝarĝo, dum por dumviva membreco necesas nur unufoja pago, sendepende de fluktuoj de oniaj financaj kondiĉoj. Mi mem fariĝis dumviva membro en miaj tridekaj jaroj, kaj poste mi povis komplete forgesi pri la kotizo.


2. Oni cerbumas vane kiel eviti pereigan hereditimposton. Se oni donacas al infanoj, la fisko nepre eltrovos kaj altrudos donac-imposton. Pago de kotizo estas rigardata kiel kuranta elspezo, kaj la aŭtoritatoj ne persekutas. Tiamaniere oni povas savi almenaŭ parton de sia havaĵo el la grifaj ungegoj de l' ŝtato.

3. Kiam miaj infanoj estis malgrandaj, mi paroladis al ili nur en Esperanto, sed preskaŭ nur en la semajnfinoj, ĉar en malriĉa lando — kia estas Japanio — patroj devas laboregi, ofte dediĉante eĉ semajnfinojn al la gloro de la kapitalo. Tial mia influo estis fine plene eklipsita de tiu de la ludkunuloj. Post mia morto miaj infanoj komplete forgesos min, kiel kutimas ĉiuj idoj, sed ĉiun monaton la UEA-revuo estos liverata, kio memorigos ilin pri mi almenaŭ unu fojon monate. Ili enmanigos la revuon el la poŝtkesto, dirante al si: “La oldulo estis ja strangulo”. Tio estas pli valora ol impona tombo.

Se ĉiuj membroj de UEA, ĉiun fojon kiam naskiĝas al ili infano, farus ĝin nepre dumviva membro, tio multigus nian membraron — kaj kio estas pli grava, nian enspezon, je kelkdekoj da procentoj, depende de demografia stokastiko.

YAMASAKI Seikō (Japanio)

Recenzoj



Potencaj deziroj malprudentigaj

La manto (Mantis religiosa). Romano. Paula Mährti (ps.). Chapecó: Fonto, 1997. 182p. 21cm. 30,00 gld.

Manto estas insekto kies ino postkoite manĝas parton de la kunkoitanto. “Manto” estas la insulto kiun la perfidita edzo en ĉi tiu romano ĵetas al sia eksedzino je la fino de 15-jara geedzeco. La insultanto estas Georg Brentano, Esperanta instruisto kaj aktivulo, kaj la insultato — kiu aĝas 14 jarojn malpli — estas Paula Mährti, lia lernintino pri Esperanto. Kaj “Paula Mährti” nomiĝas ne nur la ĉefrolulino de la romano, sed ankaŭ ties aŭtorino.

Antaŭ kaj dum la geedzeco ŝi lernis de Brentano ne nur pri la internacia lingvo, sed ankaŭ pri la amorarto. Ŝi bone studis ambaŭ, kaj fine uzis ambaŭ kun aliaj.

Multajn jarojn post la esperantistiĝo kaj edziniĝo Paula Mährti renkontas kaj ekamas Esperantan verkiston, redaktiston kaj reĝisoron, Walter Hari-mann, kies plumnomo estas Georg Selten. Tiu brila esperantisto aĝas 11

jarojn malpli ol lia nova amantino. La historion de la geedzeco kaj de la am-triangulo Mährti rakontas en facile legebla, preskaŭ babileca stilo. Oni



povas imagi ke ŝi priskribas siajn vivo-spertojn dum kaŝtrinkado: la mal-feliĉan infanecon, tri seksperfortojn, bonan kunlaboron kun la edzo por krei familion kaj aĉeti belan domon, vojaĝojn eksterlanden por ĉeesti en Universalaj Kongresoj kaj aliaj Esper-antaj kunestoj, fine perfidojn kaj edzan perforton.

Ĉi tiu romano interesos esperan-tistojn aparte pro tio ke la ĉefaj eventoj okazas en Esperantaj medioj. Iufoje

PAULA
MÄHRTI



La
Manto
romano

Fonto

La ilustraĵo sur la dorso de *La manto* (origine aperinta en *Hungara Vivo*) estas kredeble pli alloga ol la desegno sur ĝia antaŭa kovrilo.

Kritiko al Hipokrato

La korpo de la homo. Enkonduko al konstruo kaj funkcio. Harald Schicke (1953). Buchholz: MZ, 1995 (2-a, pliampleksigita eld.). 148p. 21cm. Ilustrita. 30,00 gld.

Ha, kiel bela libro, laŭdata de sorĉita leganto sur la lasta kovril-paĝo! Jen verko, preskaŭ unika en Es-peranto, kiu priskribas koncize, precize, per lingvo tuj komprenebla kaj belaj, simplaj ilustraĵoj, la mirin-daĵojn de la homa korpo.

Bedaŭrinde la talenta verkisto ne kontentiĝas priskribi kiel neŭtrala sci-encisto. Li ankaŭ deziras — ĉu ne normala afero por kuracisto? — eduki la suferantan beoton laŭ sia “natura metodo”, profitante la okazon por averti lin kontraŭ la malsaĝaj okci-dentaj medicinistoj, kiuj ĉiumomente trompas, venenas, buĉetas sian kom-patindan pacienton. Tial li disŝutas tra

tiu fundamenta — ve! — libro multajn konsilojn, fakte foje pravajn, sed ofte dubindajn, eĉ tute kritikendajn: vidu ekz. liajn komentariojn pri sango-premo, laboratoria esploro, kontraŭ-koncipado (laŭdo de la ĉina politiko, plumpa ŝerco pri Dipatrino Maria), la utileco de la cekuma apendico, la “damaĝa laboro de dentkuracistoj”!

Rilate la fakan terminaron, la aŭ-toro faris nekonskvencajn elektojn: foje li konservis terminojn eksmodajn, foje preferis idiotismajn, foje senkiale kaj neutile devojiĝis de la komuna evoluo (PIV, poste *Esperanta medi-cina terminaro*, nun *Angla-Esperanta medicina terminaro*). Por la ne-

medicinista leganto, li eĉ gaje vicigas simpligitajn kaj hermetikajn ter-minojn, malgraŭ sia demagogia kritiko de la Hipokrata ĵuro, sur p. 134 trafe titolita “Pri medicinaj fakvortoj en Esperanto”...!

Fine, krom la malfacile eviteblaj koboldoludoj, veraj eraroj makulas dekojn da paĝoj:

- misuzo de *po*, *nur*, *-ig-*, *-iĝ-* ktp;
- nocioj pri la interna spirado, la timuso ktp;
- *sinapso* anstataŭ *konektilo* (ilustraĵo 5), *ilio* anst. *iskio* kaj reciproke (ilus. 8, 9), *piedfingro* anst. *pied-falango* (ilus. 15), *subbrako* anst. *antaŭbrako*, *tendingo* anst. *tenden-ingo*, *palatino* anst. *palato*, *vertigo* anst. *vertiĝo* ktp.

Tamen, tamen, kiel bela libro ĝi estus, kaj kiom grava por nia komu-numo!

D-ro Blaise Berthonneau (Francio)

Mährti mencias renkontojn kun famaj esperantistoj, kies fikciaj nomoj similas al tiuj de famaj malfikciuloj. Ŝi ankaŭ prezentas la ideojn de sia instruisto-edzo pri la uzo de novradikaj vortoj, kaj ŝi montras sian samopiniadon per tiaj vortelektaj en la teksto mem. Ŝi tre bone, tre nature formas kunmetitajn vortojn, sed ŝi uzas ankaŭ literaturajn vortojn kaj novradikajn kiel *mava*, *smajlo*, *hati*, *imensa*, *tarde* kaj *objetas*. Dupaĝa glosaro donas difinojn de ne-PIV-aj vortoj.

La stilo de Paula Mährti montras tri specialajn ecojn. Kvazaŭ romanisto de iu frua jarcento, ŝi kutime finas ĉapitron per frazo kiu eksplicite invitas la "karajn legantojn" ekscii pli per la sekva ĉapitro. Ŝi ofte uzas triopon da sinonimoj aŭ preskaŭ-sinonimoj en la sama frazo, kiel "kojoto, serpento kaj vampiro" (temas pri la eks-edzo) aŭ "aspiroj, streboj, revoj", aŭ ke ŝi "antaŭplanis, deziris, sopiris vojaĝi nur kun" Walter. Plej ofte la verboj de la rakonto estas en la as-modo, kutime post unu is-moda verbo enkonduka. Tiuj stilaj kvalitoj estas verŝajne nai-vaj, sed ili fakte faciligas la legadon kaj donas al la libro la menciitan babilecan tonon.

La libro certe ne estas por pruduloj. Paula Mährti priskribas seksajn spertojn. Plej gravas ke ŝi prezentas la menson de virino kun tre forta volo, kies potencaj deziroj ŝin malprudentigas.

Sylvan Zajt (Usono)


La klono de profesoro Cho

La bildstria gvido al genetiko. Larry Gonick, Mark Wheelis. El la angla trad. Sung Ho Cho. Seulo: Librejo Akademio, 1996. 216p. 22cm. 27,00 gld.

"Kial mi ne aŭskultis mian panjon kaj ne fariĝis advokato?" — demandas frustrita studento sur la paĝoj de ĉi tiu humura bildlibro, aludante al la komplekseco de genetiko. La lertaj aŭtoroj de la amuza verko tamen sukcesis transformi la taskon studi biologion al vera plezuro. La duopo Gonick (artisto fama pro sciencaj desegnaĵoj) — Wheelis (sperta

Mendelan heredadon kaj la sekretojn de la DNA-molekuloj, jen vi ĝuos ekkomprenon. Impresas la abundeco de la ilustraĵoj kun spritaj tekstoj.

Prezenti genetikon facile al la esperantistaro ŝajnas la ĉefa celo de la verko. Sed krome la E-lingva klono de libro el prestiĝa multtema serio kreas novan ŝancon popularigi Esperanton inter sciencistoj. Montru la



Malvolvu iun ajn proteinion, kaj vi trovos, ke ĝi estas simple ĉeno de aminoacidoj.

aŭtoro de scienc-popularigaj tekstoj) kreis verkon ege allogan. Prof. Cho, biologo-esperantisto, kompetente elangligis la libron. La korea eldonisto Librejo Akademio certigis altkvalitan formon. Fine, la indekso kaj terminologia vortareto vere utilas. La libro do aperas samtempe amuza kaj kleriga, alloga, humura kaj bonkvaila. Se vi ne ankoraŭ komprenis la

libron al ne-esperantista instruisto de biologio aŭ al profesora konato, kiuj pene baraktas kun sia "profesia" uzo de la angla. . . La vere imitinda kaj valora verko de Gonick-Wheelis-Cho impresos ilin kaj helpas kontraŭbatali la miton ke "la angla servas bone kiel la internacia lingvo de sciencoj". Ja ni scias ke Esperanto taŭgas pli.

Leszek Kordylewski (Usono)

Helpiloj al memhelpado

Receptaro de kuracaj plantoj. Nikla Donev (1914). Buchholz: MZ, 1995. 64p. 21cm. 15,60 gld. **Sanon! Kuracu vin mem per naturaj medikamentoj.** Jaime Scolnik (1908-96). Buchholz: MZ, 1995. 318p. 21cm. 49,50 gld. **Sin nutri en la naturo.** Edmond Dazun (1909), André Andrieu (1932). Beauville: Amika E-Rondo Laŭte!, 1995. 223p. 21cm. Ilus. 29,70 gld.

Jen tri konsillibroj kiuj manku nek al kuracisto kaj farmaciisto nek al interesatoj pri sana vivo.

La plej fake ellaborita, tamen facile komprenebla kaj tre praktika, estas *Receptaro*: broŝuro enciklopediece informanta pri la kurac-efikoj de 67 plantoj konataj de la popolmedicino. Por ĉiu planto estas indikataj la partoj uzataj, la kemia konsisto kaj biologiaj efikoj. Sekvas indikoj pri preparmanieroj, dozado, kombin-ebloj, uzmanieroj. Kelkfoje la indikoj estas tro koncizaj, ekzemple kiam la aŭtoro asertas (p. 21) ke "loka uzado de

avenaj flokoj stimulas kreskadon de la hararo". Se ni do dum venonta UK vidos samideanojn kun matenmanĝa kaĉo surkalvaĝe, ni tuj ekscios ke ili naturkuraciĝas. . .

Sanon! pritraktas multajn malsanojn kaj prezentas eblojn de memkurado kaj de sana vivo. La unua parto priskribas kiel eviti malsanojn. Triobla estas laŭ Scolnik la devo prizorgi nian sanon: devo al ni mem, devo al niaj idoj, devo al la socio. Kiel faktorojn de la sano li mencias la aeron kaj la nutradon, fizikan kaj spiritan aktivecon, ripozon kaj sin-

flegadon, ĉastecon (!) kaj naturismon. 200 paĝoj traktas kiel kuraci diversajn malsanojn. Kompreneble la libro ne povas anstataŭi kuracistan konsultadon, sed ĝi povas helpi al memhelpado kaj respondeco pri si. La verko estas iomete fundamentisma kompendio de la naturismaj ideoj de la 19-a jarcento. Sed por nia faklingvo ĝi estas sendube granda gajno.

Sin nutri en la naturo estas alfabetita kompilaĵo pri ĉ. 400 manĝeblaj plantaj specioj plejparte bildigitaj kaj simple priskribitaj, kun indiko de la efikoj, terapia uzo kaj preparmaniero. Aparta listo atentigas ke multaj plantoj povas esti ankaŭ danĝeraj kaj venenaj. Alia listo ŝtopas terminologian breĉon: botanika nomenklaturado latin-Esperanta, verkita laŭ la dekkvina regulo de Zamenhof. Kompreneble, la listo estas diskutinda, tamen akceptinda.

Hubertus M. Schweizer (Germanio)

Pastinako de l' jaro

Ĝis revido krokodilido! Dek kvin noveloj originalaj. Sten Johansson. Skövde: Al-fab-et-o, 1996. 68p. 21cm. 12,60 gld.

Dek kvin rakontoj enestas en tiu ĉi kolekto, jam la dua, de la svedo Sten Johansson. La libreto havas du partojn: la unuaj ok rakontoj havas temojn apartajn, ĝeneralajn; la sekvaj sep temas pri Esperantujo, esperantaj kaj esperantuloj. Karakterizas la aŭtoron flua proza stilo, leĝera kaj senĝene anekdoteca, des pli en la primovadaĵoj. En ili palpeblas lia emo al ironio kaj satiro, kutime pri lingvaj manieroj aŭ skoloj, kun tono pli proksima al Louis Beaucaire kaj f-ino Barlaston ol al Izrael Lejzerowicz kaj Miĥail Bulgakov. Speciale amuza montriĝas “Mia nobelpremio”, ricevinta la premion “K. Lister” de Pastinaka Esperanto-Asocio en 1996.



Pli interesa mi trovas la unuan parton. Anekdotas “Mia amata”, konstruita ekskluzive surbaze de palindromeca vortludo. Same tekna* ŝajnas al mi “La utilo de trejnado”: kie do la arto? Nenie, ĉar temas pri rakonto sen temo, nura plilongigo de blago. Kaj ĉe la tro primitiva intrigo de “Bonan matenon!” mi redemandas: kie la literaturo? Nu, ĝi bonŝanĉe vivas en “Nokta halto” (kies lasta alineo tamen elizias la magiecon de la tuto), “Ripari fenestron” (atentokapte erotika) kaj, ĉefe, “Patrino”, la sola kiu meritas la nomon novel(et)o, pri familio, religio kaj hipokriteco. Bele, se Johansson pluirus ĉi vojon iom pli ambician!

Jorge Camacho (Bruselo)

GLOSO

tekna: [el “tekniko”] homfarita, elfarita, “artefarita”.

Plaĉaj poemoj parte neuzeblaj

Al la mondo donace. Antologio de la serba porinfana poezio. El la serbokroata elektis kaj tradukis Zlatoje Martinov. Beograd: Strategia, 1996. 80+80p. 20cm. Dulingva. “Infanlibro de la jaro” en Belartaj Konkursoj 1997. 24,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Zlatoje Martinov kolektis kaj tradukis porinfanajn poeziaĵojn de 22 serbaj aŭtoroj. Unu flanko de la libro estas la serblingva antologio, la alia flanko ĝia E-traduko, laŭaspekte samrajtaj, ambaŭ kun propra kovrilo.

La unua merito de la tradukoj estas... ke ili celas infanojn. Tio povas ŝajni evidenta, sed ne ĉiam estas tiel en Esperantaj infanlibroj. Aperis tiaj kies tradukintoj certe neniam konis E-lingvan infanon, sed penis nur reprodukti ĉiujn nuancojn de sialandaj fabeloj per lingvaĵo kiun neniu uzus al vera infano. Martinov konstruas klarajn frazojn kaj uzas konkretajn, konatajn vortojn, kiuj abunde rimigiĝas.

Alia merito estas la elekto mem: la tradukinto sukcesis trovi poemojn teme kaj tone sufiĉe universalajn por plaĉi al infanoj de diversaj kulturoj.

La ĉefa malmerito de la libro estas ke la tradukoj estas parte neuzeblaj. Porinfana poezio estas antaŭ ĉio parola ĝenro, kie la formo, precipe la ritmo, subtenas parkerigon kaj kreas por la infano la unuajn estetikajn travivaĵojn prilingvajn. Sed kion pri:

*En arbar’ densa kaj homomanka /
erinac’ vagas sur padet’ blanka.*

Mi trovas nenian manieron voĉlegi ĉi tion al mia filineto sen malagrablaj kunpuŝiĝoj de akcentitaj silaboj. Kaj bedaŭrinde ĉi tiu versparo ne estas unika en la tradukoj.

Plia problemo estas la tute senbrida eliziado de la artikolo: *sed l’ profesoro, el l’ dormo, diras l’ telefon’* — aŭ la stumbliga verso *kion kun l’ katid’ fari*. Ankoraŭ unu priplorinda ekzemplo:

L’ ŝaf’ ne smeas sin defendi / Timas l’ lupon ne ofendi

Ne nur sone tio ne plu estas Esperanto. La serba/slavdevena *smei* anstataŭ *kuraĝi, rajti, povi* ne estas glisita, kaj ĉiuokaze mi ne komprenas por kio oni ĝin bezonas. *Timas l’ lupon* tordas la langon. Kaj evidente la ŝafo timas ofendi la lupon; la uzo de *ne* ŝajnas esti serbismo.

Post la tradukoj sekvas mallongaj notoj pri la aŭtoroj — aranĝitaj, eĉ en la Esperanta teksto, laŭ la serba ciril-alfabeto ordo, kvankam ankaŭ la serba parto de la libro estas presita latinlitere.

Konsiloj al la eldonejo: indus indiki la kopirajtojn, peti por la libro ISBN-numeron — kaj funde revizii la tradukojn antaŭ dua eldono.

Jouko Lindstedt (Finnlando)

Brilaj nenaturaĵoj

La maŝino kiu kriis. Div. aŭtoroj. Vieno: Pro Esperanto, 1995. 105p. 23cm. 22,50 gld.



Herbert Mayer certe havis brilan ideon kolekti 11 rakontojn pri la ĝenro “nenaturaj fenomenoj”. Li trafte elektis, precipe pro tio ke la 11 aŭtoroj

estas malsamnacaj kaj malsamtempaj, kaj tial eblas kompari la diversajn verkistilojn kaj la evoluon de la lingvo. Kun miro mi konstatis ke la diferencoj ne estas tiom frappe evidantaj, kio estas konsola: ne, nia lingvo ne disdialektigis. Kompreneble iuj arkaismoj enestas (*allasi* = *agnoski*; *superakvego* = *inundo*; *gluti* = vori k.s.). La plej multaj rakontoj estas interesaj, kelkaj ŝoke surprizaj, nur tiujn de Payson kaj Salovaara mi taksis banaletaj. Gratulinde Mayer liveras biografiajn notojn pri ĉiu aŭtoro, pri Borovko (“inkunabla” verkisto, laŭ li) eĉ 5-paĝan. La libro estas elegantaspekta, senerara, kun bela papero kaj klaraj litertipoj. Laŭ la zorganto de la humile nomita “mikroeldonejo” (kiu jam proponis plurajn valorajn verkojn) jam pretas dua samĝenra libro. Ĉi tiun mi varme konsilas al kiu ajn.

Aldo de’ Giorgi (Italio)

Laste aperis



Amara vivoĵo. M. Mandrik (1902). Berkeley: Eldonejo Bero, 1997. 79p. ISBN 1 882251 21 0. 22cm. Aŭtobiografio de Honora Membro de UEA el Bjelorusio, punlaborinta kvin jarojn pro sia Esperanto-agado, kiu spertis ĉiujn eventojn en sia mondparto de antaŭ la ekesto de Sovetio ĝis post ties kolapso. 16,80 gld.

Bahaismo kaj Esperanto. Festlibro okaze de la dudekkvinjariĝo de Bahaa Esperanto-Ligo. Frankfurt: BEL, 1997. 57p. 30cm. Kun artikoloj pri la rilatoj inter la movadoj bahaa kaj Esperanta, kaj pri elstaraj bahaaĵoj esperantistaj. 6,60 gld.

Brulanta kastelo, La (1949). Leopold Vermeiren (1914). Ilustris J. de Simpele. El la flandra trad. Ivo Durwael. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1997. 48p. ISBN 90 71205 71 1. 20cm. Mezepoka historio pri la Ruĝa Kavaliro. 6,90 gld.

Ĉu via bebo aŭdas? Frua serĉado de aŭdodifektoj ĉe infanoj. Kompendio por infanprizorgocentroj. Aira Kankkunen (1928). El la sveda trad. la aŭtoro. Göteborg: la aŭtoro, 1997 (neindikita). 47p. ISBN 91 972463 1 X. 21cm. 7,50 gld.

Dek novaj kantoj. Komp. kaj trad. Adolf Burkhardt (1929). München: Münchner Arbeitsstelle Kirchentag, 1993. 14p. 21cm. La dek plej bonaj kantoj de la germanaj Ekleziaj Tagoj. 3,90 gld.

De la itala al Esperanto. Historio de vortaro. Carlo Minnaja (1940). Trieste: Triesta Esperanto-Asocio, 1995. 12p. 21cm. Prelego pri la estiĝo de la grandioza itala-Esperanta vortaro de Carlo Minnaja. 3,90 gld.

Dio benu. Praktika kompendio. Kompilis Miloslav Šváček (1941). Ĉeĥa IKUE-Sekcio, 1996. 215p. 15cm. Preĝoj, teksto de meso, kantotekstoj. 7,50 gld.

Diplomato kiu ridis, La. Ralph Harry (1917). Bakers Hill & Beverley: Bookleaf Publishing, 1997. 61p. ISBN 1 876042 07 9. 21cm. Veraj historioj — ofte amuzaj kaj pensigaj — el la vivo de diplomato. 24,00 gld.

Egemaljuna Eterno (1986). Heljo Mänd. Ilustris Marike Laht. El la estona trad. Valev Kruusalu. Tallinn: Esperanto-Asocio de Estonio, 1995. 47p. 20cm. Fabeletoj pri la tempo, sezonoj kaj naturo. 10,50 gld.

Ekumena diserva libro. Prov-eldono; 2-a kajero: Diservoj. Villingen: Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI, 1997. 129+11p. 21cm. Ringe bind. Kantoj, liturgio, meso, komuna preĝo laŭ Taizé. 12,00 gld.

Esperanto-hebrea vortaro. H. Mašler (1908-91) kaj J. Murjan (1920). Tel-Aviv: Instituto de E-o, 1991. 28p. 25cm. 12,90 gld.



Samtempe kun Pajleroj kaj stoploj de Auld, ankaŭ Gerrit Berveling envolumigis siajn verkojn diversrevuajn.

Esperanto, Interlinguistics, and Planned Language. Papers of the Center for Research and Documentation on World Language Problems 5. Red. Humphrey Tonkin. Lanham/New York/Oxford — Rotterdam/Hartford: University Press of America/CED, 1997. 23+229p. ISBN 0 7618 0847 7. 24cm. 12 tekstoj en la angla, po 1 en la franca kaj germana. Bind. Esperantologiaj kaj interlingvistikaj materialoj aperintaj ekde 1985 en la revuo *Language Problems and Language Planning*. 96,00 gld.

Estonoj tra tempo I. Valev Kruusalu. Tallinn: Esperanto-Asocio de Estonio, 1997. 69p. ISBN 9985 9130 0 0. 21cm. Ilus. Epizodoj el la estona historio. 13,50 gld.

Gaja leganto per Esperanto. Spritaĵoj, vortuldoj, preseraroj, anekdotoj, matematikaj. P.E. Schwerin. Red. Ralph Harry kaj Donald Broadbent. Beverley: Bookleaf Publishing, 1997. 64 (nenumiritaj) p. ISBN 1 876042 10 9. 21cm. 12,00 gld.

“Kiu estas kiu” pri aktivaj esperantistoj japanregionaj. Kompilis T. Kobayashi kaj Y. Hagiwara. Japanlingva. Tokio: Centro de Internacia Informo pri Esperanto, 1996. 4+110p. 26cm. Ducento da biografietoj kun portretfotoj. 28,50 gld.

Leksikaj ekskursoj. Unua volumo. Christiane de Vleminck kaj Emile van Damme (1927). Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1997. 118p. ISBN 90 71205 69 X. 20cm. Ekskursoj tra la lingvo Esperanto por riĉigo de la vort-trezoro. 27,00 gld.

Mia pado. Gerrit Berveling (1944). Chapeco: Fonto, 1997. 311p. 21cm. Tekstoj el 25 jaroj, diversĝenraj: artikoloj, eseoj, prelegoj, predikoj, intervjuoj, noveloj kaj poemoj. 52,80 gld.

Vulpo kaj la vinberoj, La. Guilherme Figueiredo. El la portugala trad. Benedicto Silva. Chapeco: Fonto, 1997. 90p. 21cm. “Serioza komedio” pri helena filozofo. 21,00 gld.

DIVERSAĴO

Poŝtkarto: Kvin elementoj. “Tero, akvo, fajro, aero kaj Esperanto”. Zuriko: Ernesti, 1996. 0,90 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Laste reaperis...

pluraj elĉerpitaj libroj, en tre limigita kvanto. Mendu laŭ la kutimaj kondiĉoj ĉe la Libroservo de UEA. Sesona rabato ekde tri ekzempleroj.

Danco ĉirkaŭ lokomobilo. Mats Traat. 174p. 1984. 12,00 gld.

Elektitaj satiroj. Efraim Kiŝon. 111p. 1981. 18,00 gld.

La firmao de la kato, kiu pilkludas. Honoré de Balzac. 73p. 1924. 4,50 gld.

Halina dokumento (pri la studentaj jaroj de Zamenhof). 271p. 1977. 36,00 gld.

Internacia Lingvistika Simpozio, Kumrovec 1975. 257p. 1976. 33,00 gld.

Kalevipoeg. Estona popola eposo. Trad. Hilda Dresen. 86p. 1975. 9,00 gld.

Kanto de juneco. Yang Mo. Fama ĉina romano. 303p. 1981. 12,00 gld.

Laktisto de Mäeküla. Eduard Vilde. 255p. 1983. 15,00 gld.

Leo Tolstoj. Studo de Victor Lebrun. 402+23p. 1978. 45,00 gld.

Leteroj de L.L. Zamenhof 1907-14. Red. G. Waringhien. 372p. 1948. 30,00 gld.

Nepalo malfermas la pordon. Tibor Sekelj. 1959. 36,00 gld.

Rakontoj el unua poŝo kaj... Karel Čapek. 285p. 1981. 21,00 gld.

Slovaka antologio. 525p. Bindita. Ilustrita. 1977. 27,00 gld.

Tragedio en la universo. Fama traduko de I. Rotkvić. 94p. 1961. 12,00 gld.

Vagabondo kaj sinjorino. Romano de W. Klopffler. 204p. Bind. 1931. 9,00 gld.

Zamenhof: Leteroj. 360 leteroj. Red. A. Holzhaus. 329p. 1975. 39,90 gld.

Ankaŭ mi volas


aboni en 1998 al

EVENTOJ!

Baza kotizo: 74 NLG, aerpoŝte: 86 NLG

• Amiko 25-jara daŭre Juna

En 1997 *Juna Amiko* fariĝis 25-jara. La jarkvarona, 24-paĝa revuo por lerneĵanoj kaj komencantoj, kiun redaktas Géza Kurucz (Hitel u. 10, HU-6000 Kecskemét, Hungario; bjg@mail.datanet.hu) kaj lingve revizias André Albault, paradas inter la plej grandaj E-revuoj: ĝi havas kunlaborantojn (i.a. 3 grafikistojn) en 14 landoj kaj legantojn en 82 landoj.



La eldonkvanto de *Juna Amiko* altiĝis de 2000 ĝis 3000 ene de unu jaro. Tio okazis ĉefe pro la decido de Brazilia Esperanto-Ligo pri kolektiva abono de 800 ekzempleroj: BEL dissendas la revuon kun la propra gazeto al ĉiu sia membro. Landoj kun pli ol 50 abonantoj estas krome Francio, Hungario, Kroatio, Italio kaj Usono. (*Juna Amiko*, *La Ondo de Esperanto*)

• Szerdahelyi antaŭ 20 jaroj

En 1977 aperis 414-paĝa hungarlingva monografio interlingvistika de István Szerdahelyi, *Bábelről a világnyelvig* ("De Babelo al la mondlingvo"), verko komparebla al la libroj *Internationale Plansprachen* (1985) de Detlev Blanke kaj *Mejdunarodnije vspomogatelnije jaziki* (1990) de Aleksandr Duliĉenko. (La sama jaro vidis la aperon ĉe la Budapeŝta Universitato ELTE, zorge de la Esperanto-fako de Szerdahelyi, de ampleksaj *Esperantologiaj kajeroj* 2 kaj 3.) La lingvisto Blazio Vaha, kiu memorigas pri ĉi tiu 20-jara datreveno, rimarkigas ke, kvankam "pluraj temoj, tiutempe neglektataj, nun furoras kaj alportas popularecon al esploristoj", tamen "krom laŭdindaj esploristoj en la sfero Esperanta tre malmultaj sciencistoj referencas je Szerdahelyi". *Bábelről a világnyelvig*, kiu onidire ja havas Esperantan tradukon, meritis eldonon — eĉ se malfruan je 20 jaroj — en nia lingvo.

• Memorlibro pri René Matoušek

René Matoušek (1958), esperantisto kiu malaperis en Vukovar dum la milito en Kroatio en 1991, ricevis sian memorlibron. Eldonis ĝin la kulturdomo en Velika Gorica, la urbo kie li loĝis dum siaj studjaroj kaj kies Esperanto-klubon li prezidis. Pri Matoušek kaj Esperanto verkis por ĝi Spomenka Štimec. La libro estis prezentita en Velika Gorica la 20-an de novembro, precize ses jarojn post kiam René Matoušek malaperis kun multaj siaj kuncivitanoj. (S. Štimec)

• Vogelmann hungare

En novembro aperis ĉe la eldonejo Trezoro de Vilmos Benczik hungara traduko de *La nova realismo* de Bruno Vogelmann. Tradukis ĝin Péter András Rados, la tradukon kontrolis Blazio Vaha, reviziis Gyöngyi Mézes.

• Anekdotaĵo per Esperanto

La tagon antaŭ la konferenco de Pola E-Asocio en Gliwice (10-11 nov., vd. p. 6), la loka Klubo de Internacia Gazetaro kaj Libroj gastigis la solenan lanĉon de pollingva "Granda libro de anekdotoj" de Andrzej Pettyn, ĉ. 400-paĝa luksa volumo. La ĉeestanta kelkdeko da homoj informiĝis ankaŭ pri Esperanto, kiu ebligis la kolektadon de 1300 anekdotoj pri 900 herooj el la tuta mondo, i.a. Zamenhof, Grabowski kaj la la esperantista hungara pianisto Imre Ungár. Pettyn antaŭvidas E-lingvan eldonon post nelonge.

• Kelklinie pri...

Esperanta Ŝako havas novan redaktoron: Arvo Reede, Øpetaja 27, EE-3170 Haapsalu, Estonio. ... *Esperantisto Slovaka* estas ekde nun trovebla (kaj abonebla) ĉe <http://www.esperanto.sk>. ... Pro personaj cirkonstancoj de la redaktoro d-ro Thomas Goldman, *Ekonomia Bulteno pri Usono* (1980-1996) ne plu aperas. ... Péter András Rados hungarigis kaj enkondukis, por la n-ro 97/2-3 de la kultura revuo *Tekintet* (lanĉita en 1988 de Hungara E-Asocio, sed sendependa de ĝi) *Post la granda milito — Alvoko al la diplomatoj* de Zamenhof. ... Nova adreso de la reta revuo *Komentoj*: <http://www.esperanto.ch/Komentoj>. ... Fondita en 1949, la ĉiumonata, 6-paĝa bulteno *Berlina Informilo* aperigis jam sian 500-an numeron (6/97), nun sub la redakto de Sebastiano Hartviga.

Baza legolisto ĝisdatigita

William Auld ĝisdatigis sian faman "Baza legolisto de la originala Esperanta literaturo", kiu unue aperis en *La fenomeno Esperanto* (kaj en nia revuo: apr. '89, p. 68) kun 51 titoloj. Auld nun taksas el la prozistoj de la listo eventuale forpuŝeblaj la aŭtorojn Konisi, Lorjak, Rosbach, Sturmer, Tóth, kaj aldonas:

Ulrich Matthias, *Fajron sentas mi interne*
Vinko Ošlak, *Jen la sablo de mia klepsidro*
Trevor Steele, *Sed nur fragmento*
Ivan Ŝirjaev, *Sen titolo*
Spomenka Štimec, *Ombro sur interna pejzaĝo*
Eli Urbanová, *Hetajro dancas*

Pri la poetoj de la sama listo Auld malvolonte rezignus, krom eventuale Ueyama, kaj li proponas jenajn pliajn:

Mikaelo Gišpling, *El sisma zono*
Albert Goodheir, *Merlo sur menhiro*
Eŭgeno Miĥalski, *Plena poemaro* (anstataŭ *Prologo* de la sama)
Abel Montagut, *Poemo de Utnoa*
Neves, Fernández, Kamaĉo, Dek, *Ibere libere*
Armand Su, *Poemoj*
Krys Ungar, *Meznokto metropola*

Laŭ La Brita Esperantisto



• Brazilo: Membroj po semajno

Per la aliĝo de akademiano Sylla Chaves la 1-an de oktobro, Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro atingis membronombro de 200. De pasinta marto, kiam ekfunkciis la nuna AERĴ-estraro, la membraro kreskis per 34, kio egalas al unu nova membro ĉiu-semajne. (AERJ *informa*, Rio Esperantista)

Senatano Casildo Maldaner favore menciis Esperanton dum parolado antaŭ la pleno de la brazila senato, la 3-an de novembro. (R. Resende, Interredaktore)


• Ĉadio: Nova lando surmape

Per multloka informado dum longa vojaĝo, la bahaano Abdou Cedrac (B.P. 59, Moissala, Ĉadio) vekis en sia lando intereson pri Esperanto, kaj li planas krei kun siaj geamikoj landan Esperanto-organizaĵon. (La BELmonda *Letero*)

• Finnlando: Festivalo lingva

Laŭ la modelo de LingvoFesto de Dennis Keefe (vd. nov. '96, p. 196), en Jyväskylä la prezidanto de la loka Esperanto-klubo, Matti Lahtinen, iniciatis kaj ĉef-organizis la unuan finnlandan festivalon de lingvoj, la 25-an de oktobro. Dum sep horoj estis prezentataj kaj instruataj 33 lingvoj, plejparte fare de enmigrintoj. Esperanton — kiu montriĝis la dua plej populara lingvo — prezentis prof. Jouko Lindstedt. Ĉe 19 standoj oni informis pri diversaj lingvoj kaj kulturoj, disdonante frandajn specialaĵojn. La Esperanto-klubo de Jyväskylä proponis do verdan Esperanto-trinkaĵon kun kvin-pintaj tranĉaĵoj el la frukto karambolo. Post la festivalo la klubo aranĝis bazan E-kurson, al kiu aliĝis 5 homoj. (M. Lahtinen)

La lingvo-centro de la samurba universitato aranĝos la 16-an de januaro ekzamenon pri skriba kompreno de E-o, laŭnivele egalan al ĝeneralaj lingvo-ekzamenoj en finnlandaj universitatoj. Ĝi pretas aranĝi pluajn E-ekzamenojn laŭbezono. (J. Pietiläinen)



• Belgio: Revivos amikejo en Amikejo

La ĝenerala asembleo de la asocio Senlime decidis dum la lasta Trilanda Renkontiĝo (28 sep., Lieĝo) ke ĝia komitato klopodos reaktivigi la iaman Esperanto-kunvenejon Select en Kelmis, la centro de la iama Neŭtrala Moresnet, kie oni revis, antaŭ preskaŭ 100 jaroj, krei la Esperanto-ŝtaton Amikejo. (U.J. Moritz)

• Germanio: Esperanto-vilao fermiĝas

La Berlina kulturcentro Vilao Kreuzberg fermiĝis en decembro, pro monomanko de la distrikta konsilantaro. Sekve, ne plu hejmas tie la ĉiu-semajnaj E-aranĝoj, regule okazintaj ekde 1984. La agado daŭras en la kafejo Mittendrin de la kvartalo Prenzlauer Berg. (Berlina *Informilo*)

• Hungario: Donaco pri Eŭropo

300 ekzempleroj de la hungarlingva libro “Ĉu interparoli aŭ balbuti en la unuiĝanta Eŭropo?”, kies duono traktas Esperanton, estis donacitaj de la aŭtoro László Gados al la edukministerio, por ke tiu provizu per ĝi mezlernejajn bibliotekojn en la lando. Laŭ Gados la verko bone komplementas la porinstruistan manlibron “Pri Eŭropo sur la katedro”.

• Italio: Sen siesto en Triesto

Kadre de programoj (7 nov.) de la Triesta Unesko-centro, prof. Giordano Formizzi, prezidanto de Itala E-Federacio, prelegis pri “Unesko, protektanto de homaj rajtoj” al ĉ. 120 personoj: i.a. studentoj, anoj de la centro, profesoroj. Ĉeestis la prezidanto de la provinco Triesto, d-rino Marucci Vascon, kiu tuj proponis kunlabori kun Triesta E-Asocio (TEA), kun aparta atento al lernejoj interesanoj. Interesa-

tar lernejoj EU-landaj kiuj instruas E-on, kontaktu: Triesta E-Asocio, C.P. 601, IT-34100 Trieste; nored@iol.it.

Rezulte de kunlaboro inter Esperanto-grupoj de Laborkomunumo Alp-Adrio, TEA prezentis ekspozicion (20-29 nov.) el akvareloj de la hungara pentristo esperantista János B. Tóth ĉe urba galerio. (E. Tantin Ackermann, Interredaktore)

• Koreio: Ŭonbulisma subteno

La ekleziestro de la kore-devena religio ŭonbulismo, Ĝŭasan, proponis al d-ro Robert Traer, ĝenerala sekretario de Internacia Asocio por Religia Libereco, okaze de ties vizito al la ŭonbulisma centro la 30-an de aŭgusto, ke Esperanto estu komuna lingvo de la asociaj kongresoj. La monata gazeto ŭonbulisma, *Wonkwang*, publikigis en septembro ampleksan intervjuon de CHOE Taesok kun la prezidanto de UEA, LEE Chong-yeong. La E-hejmpaĝo de ŭonbulismo: <http://soback.kornet.nm.kr/~chtaesok>. (CHOE T.)

• Kubo: Invito por novembro


Kuba E-Asocio (adreso sur p. 8) invitas al sia festo de la Esperanta kulturo (20-22 nov.) en Santiago de Cuba. Alvenos reprezentantoj el ĉiuj regionoj por prezenti la kuban kulturon en Esperanto. (KEA)

Stipendio Ivo Lapenna

Starigita de la samnoma fondaĵo, Stipendio Ivo Lapenna estis aljuĝita en 1996 al magistriĝa disertacio de Jarosław A. Fotyga, "Monografio de Skolta Esperanto-Ligo 1918-1995", akceptita de Jagiellona Universitato de Krakovo. En 1997 ĝin ricevis d-rino Katalin Smidélus pro "La propedeŭtika valoro de Esperanto en la kapablo de hungaraj infanoj lernontaj la italan lingvon", disertaĵo defendita ĉe Universitato ELTE en Budapeŝto.

La stipendio estos denove atribuita en 1998 al universitat-nivela disertaĵo (doktoriĝa, magistriĝa, licencia) oficiale akceptita de universitata instanco en 1997, kiu temas pri esperantologio kaj/aŭ pri Esperanto en rilato kun interlingvistiko kaj estas ellaborita en la spirito de Zamenhof kaj Lapenna. Detala regularo: Jimmy Stryhn Meyer, p/a Lagoudaki, 59 Avenue de la Gare, LU-611 Luxembourg, Luksemburgio. La disertaĵojn sendu en du ekzempleroj, antaŭ la fino de februaro, al d-ro Klaus Perko, Lendkai 111, AT-8020 Graz, Aŭstrio.

Jimmy Stryhn Meyer



Ivo Lapenna (1909-1987), ĉe la inaŭguro de Esperanto-monumento en Linz (1965)

• Nepalo: Ekster la ĉefurbo

La nova grupeto Esperanto-Domo (GPO 3447, Kathmandu; espero@domo.mos.com.np) ekinstruis Esperanton en oktobro per 12-leciona koresponda kurso de Razen Manandhar, aperiginte du malgrandajn anoncojn en la ĵurnalo *Kantipur* kaj en la magazino *Saptahik*. Ĝis la fino de novembro venis pli ol 100 informpetoj. Antaŭe nepalanoj malofte povis legi pri Esperanto ekster la ĉefurbo Katmanduo.

• Sud-Afriko: Heredaĵo

Antaŭ tri jaroj ni raportis ('94 majo, p. 97) pri la plano de komercisto Anastasia Chassoulas testamenti grandan sumon al Esperanto-Asocio de Suda Afriko. Chassoulas mortis en 1995, kaj — kvankam li ne estis membro de EASA, nur simpatianto de Esperanto — li plenumis sian intencon. La asocio ricevis jam 300 mil randojn (ĉ. 130 mil gld.) kaj atendas plian sumon. (C.S. Beckford)

• Svedio:

Kultura lingvo en propra domo

Funkcianta ekde februaro 1997, la nova Esperanto-Domo en la vilaĝo Lesjöfors gastigis en septembro la seminarion "La kultura lingvo" de Sveda Esperanto-Instituto. Pri la temo ĉefprelegis Erich-Dieter Krause kaj Mar-



• Historio: Instituto Lapenna

La 23-an de aŭgusto fondiĝis en Vieno Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna, kiu celas okupiĝi pri la persono kaj agado de Ivo Lapenna, studi liajn verkojn, informi la gazetaron kaj protekti liajn nomon kaj verkojn. (B. Lapenna, Interredaktore)

• Instruado: Inicos MacGill

Kadre de la 10-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco (8-14 apr., Lignano Sabbiadoro, Italio) la seminario por instruantoj estos gvidata ne de Katalin Smidélus, kiel estis indikite en nia "Kalendaro" (nov., p. 193), sed de Stefan MacGill. (E. Tantin Ackermann)

• Muziko: Esperanta kopirajto

La Londona kompanio ACE eldonis kompaktdiskon de usona soul-muziko, *Dave Godin's Deep Soul Treasures Taken from The Vaults*, kun Esperantlingva teksto pri la kopirajto. Temas pri omaĝo al la esperantisteco de la kompilinto Dave Godin. (La Brita Esperantisto)

• Religio: ASISTI konferencas

Monda Konferenco pri Religio kaj Paco (WCPR) akceptis en pasintjara januaro Asocion de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj (ASISTI) kiel institucion membron, sekve de trijara klopodado. La pozitiva decido estis verŝajne nerekte influita de la por-Esperanta pledo de ĉefmajstro de la religio ŝonbulismo (vd. "Loke", p. 17), kadre de WCPR-ceremonio jubilea. La Monda Konferenco, kies sidejo troviĝas ĉe Unuiĝintaj Nacioj, estas konsiderata kiel la plej grava interreligia organizaĵo tutmonda. (Asistilo)

Junaj bonzoj lanĉis en ses lingvoj, interalie en Esperanto, "Rezolucio kontraŭ milito", memkritikan deklaron (1995) de la japana Ŝin-budhisma sekto Otani (10 milionoj da kredantoj) pri sia milita kunlaboro: <http://www.tcp-ip.or.jp/~purist/fusenn.html>. (YAMAGUTI S.)

• Sano: Unua rendevuo

La Homeopatia Instituto François Lamasson (Eneida, Rua Américo Brasileiro 1418, BR-14015-150 Ribeirão Preto, Brazilo; [+55/16/636-88-89](tel:+55166368889); lamasson@netsite.com.br) ekde 1992 utiligas Esperanton en siaj publikigaĵoj. Nun ĝi invitas ĉiujn fakulojn kaj interesiĝantojn laborantajn en la sanitara kampo aŭ en fako ligita al ĝi (ekz. tradukado, eldonado, biblioteko, historio, sociologio, antropologio, muzeologio) al internacia renkontiĝo: "Unua Rendevuo pri Esperanto kiel laborlingvo ĉe la kampo de sano" okazos de la 1-a ĝis la 3-a de majo en Ribeirão Preto (Brazilo). (Interredaktore)

jorie Boulton. Aira Kankkunen, aŭtoro de la ĵus aperinta libro *Ĉu via bebo aŭdas?* (vd. "Laste aperis", p. 15), parolis pri siaj klopodoj "malfermi la lingvo-pordojn por surdaj infanetoj". Zofia Banet-Fornalowa rakontis pri la pola pedagogo Janusz Korczak, mortigita en koncentrejo. Jerzy Fornal prezentis programon pri "La Esperanto-teatro dum 100 jaroj". Andrea Forman kantis kaj rakontis pri la brazila bieno-lernejo Bona Espero. Boulton kaj Roland Lindblom recitis poezion, kaj Sten Johansson legis sian novelon *Dufoja ekspono*. Estis videbla nova profesia videofilmo de Viljo Mentu pri Esperanto kaj pri la kursoj ĉe la Popola Altlernejo en Karlskoga. (W. Posthuma, Interredaktore)

• Ukrainio: Verdaĵo festis

Tuj post la Ago-Tago, la 5-an de okt., kelkaj radiostacioj kaj kvar lokaj gazetoj en Odeso raportis pri la 40-jariĝo (24 sep.) de la Esperanto-agado en la Domo de Sciencistoj, festo en kiu kunvenis ĉ. 70 amikoj de Esperanto kaj de la loka junulara klubo Verdaĵo. Alvenis 24 esperantistaj gratuloj el 13 landoj. La gazetoj aperigis ankaŭ artikolojn pri Esperanto, ĝiaj historio kaj nunaj celoj, kaj pri la klubo Verdaĵo. (T. Aŭderskaja, Interredaktore)

• Sociala laboro: Virina estraro

La estraro de Asocio de Sociallaborantoj Esperantistaj (fondita en 1996), kiu konsistas el ses nord-eŭropaj social-laborantinoj, kunsidis la 12-an de oktobro en Stokholmo kaj decidis i.a. malaltigi la membrokotizon al duono, 15 gld. Elfriede Blasius (Hamburgo) komencis ellabori fakvortaron pri sociala laboro. (*Informilo de ASLE*)

• Turismo: Pli ol stilekzerco

Membroj kaj kursanoj de la Esperanto-Centro de Angers (Francio) konkurse esperantigis turismajn faldfoliojn kaj gvidilojn de sia regiono (Valo de Luaro). Rezultis 44 tradukoj, el kiuj pluraj ricevis premiojn, disponigitajn de turismaj kaj aliaj instancoj lokaj. Oni nun klopodas loki kiel eble plej multajn el tiuj Esperantlingvaj tekstoĵoj ĉe la koncernaj turismejoj. La esperantistoj raportis pri la iniciato en lokaj ĵurnaloj. (A. Frangeul, *Eventoj*)

Esperanto-grupo de Normandio zorgis pri Esperantlingva versio por


la informpaĝoj de la regiona turisma instanco. Ĝi estas trovebla ĉe <http://www.normandy-tourism.org/esperanto/01bienv/bienv.html>. (D. Couturier, Interredaktore)

Kataluna Esperanto-Asocio plenumis similan laboron por la urbo Arenys de Mar: <http://www.partal.com/arenys/arribat.html>. (*Kataluna Esperantisto*)

Kvinlingva (i.a. Esperanta) kompaktdisko pri la urbo Erfurto estas mendebla ĉe Karlo Sommer (PF 458, DE-99009 Erfurt, Germanio; KSommer344@aol.com). Germanlingva programo sur la disko krome informas pri Esperanto. (*Voĉo el Turingujo*)

Pro la kampanjo "Esperanto kaj turismo" amasiĝis lastatempe ĉe Constant Borremans (Pf. 2004, DE-21239 Buchholz, Germanio) turismaj projektoj kaj dokumentoj. Muzeoj, bibliotekoj kaj ekspozicioj interesataj pri tiuj materialoj povas ricevi ilin kontraŭ sendokostoj.

Esperantistaj retadreso 1993-1997



• Interretujo: Nehaltigebla kresko

Laŭ statistiko de *Eventoj*, nehaltigeble kreskas la kvanto de esperantistaj retuzantoj. Jen la ciferoj:

Je 11 feb. 1993: 310 adresoj de 219 personoj el 26 landoj. 67 landaj kaj lokaj organizoj/gazetoj, kaj 18 internaciaj. Je 1 jan. 1994: La koncernaj ciferoj estas respektive: 528, 364, 37, 125 kaj 28. Je 1 jan. 1995: 688, 485, 44, 174, 36. Je 1 jan. 1996: 876, 624, 50, 191, 42. Je 1 jan. 1997: 1255, 959, 61, 265, 55 (hejmpaĝoj: 181). Je 1 sep. 1997: 1601, 1203, 63, 332, 61 (hejmpaĝoj: 286).

ANONCETOJ

Michela Lipari elkore dankas ĉiujn gesamideanojn, amikojn kaj nekonatojn, kiuj bondeziris al ŝi okaze de ŝia akcidento. Nun ŝi jam bone fartas.

La Esperanto-Centro Paderborn (direktoro BERMANO Hermano) translokiĝis. La nova adreso: DE-12159 Berlin, Rheinstr. 9; ☎/☐+49/(0)30/85-96-13-83. Tie aperis intertempe la *Specialaj Cirkuleroj* 63+64 kaj krome la nova Librolisto n-ro 10. Petu ilin aldonante 3 DM en poŝtmarkoj aŭ 2 int. respondkuponojn.

Dankon al ĉiuj gratul-salutintaj la naskiĝon de nia filo Ruben Joseph. Fabienne Berthelot kaj István Ertl.

Adresaro de esperantistoj ukrainiaj akirebla por 2 USD: V. Hordijenko, p.k. 35, UA-252133 Kijiv-133, Ukrainio.

Ante FERENČIĆ (1926-1997) mortis la 13-an de novembro en Genevo. Lerninte Esperanton kiel 14-jarulo, de 1945 li aktivis en Zagrebo kiel preleganto kaj kursgvidanto. Li servis kiel sekretario de Jugoslavia Esperanto-Federacio (1950-52) kaj prezidanto de Kroatia E-Ligo (1978-80). Internacie renoma geologo, li gvidis teamon kiu malkovris la plej grandajn trovejojn de kupro kaj fero en Venezuelo.

Juan J. JUANES SAINZ (1920-1997), prizorginto de la radioprogramo "Esperanto sur la anteno" ĉe Radio Bilbao (1953-66), aŭtoro de la lernolibro *Metodo Bilbao*, deĵoranto pri informado en la Madrida UK (1968), kiu verkis la teatraĵon *Kiam Karla alvenis* (1972) kaj gajnis poeziajn premiojn, mortis la 26-an de majo en Algorta (Hispanio).

John A. MATHEWS (1921-1997), delegito en Sacramento, refondinto de la loka Esperanto-Asocio, gvidinto de kursoj, mortis lastatempe.

Ruth MCGRATH (1923-1997), dumviva membro, delegito en Perto (Aŭstralio) dum kvardeko da jaroj, poste ankaŭ fakdelegito pri turismo, forpasis la 20-an de septembro. Ŝi tradukis la romanon *Sep junaj aŭstralianoj* (1995).

Rikardo ŜULCO (1906-1997), poeto, tradukisto, gramatikisto, unu el la plej fekundaj kaj diskutvekaj figuroj de Esperantujo en la lastaj du jardekoj, forpasis la 26-an oktobro en Minden (Germanio).

Li konatiĝis kun Esperanto en la 20-aj jaroj, sed dediĉis sin al ĝi nur post la emeritiĝo, ĉ. 1970. Inspirite de la verkaro de L. Mimó Espinalt, li iniciatis la analizan skolon, kiu — konsiderante Esperanton nur kiel *planlingvon* — insistas pri ties reguleco kaj logikeco, pro timo ke alie ĝin disfalis facilanimaĵoj kaj kapricoj en la uzado.

Lia plurmilpaĝa verkaro inkluzivas i.a. la poemkolektojn *La trombonoj de Jeriko* (1984), *Vespero jam fariĝis* (1985) kaj *La mago* (1989); la tradukojn *Trigroŝa romano* de Brecht (1977), *La perdita honoro de iu Katarino Blum* de Böll (1978), *Pendumilaj lidoj* (1980) kaj *Palmŝtrojmo* de Morgenstern (1983), *Amuza legado pri Til' Strigospegul'* (1987), *Banalaj historioj*



Foto: Esperanto-Centro Paderborn

Rikardo Ŝulco

de Czerny (1991); la poeziajn "legolibrojn" *La muzino* (1992, poemtrajdukoj el deko da lingvoj) kaj *La viro en la luno* (1994); kaj la germanlingvajn *Mein geliebtes Esperanto* (1976, 4 eldonoj), *Europäische Hochsprache oder Sprachimperialismus?* (1979) kaj *Was nun Esperanto betrifft* (1986). Pri lingvaj demandoj li verkis — krom deko da broŝuroj — *Pledo por unueca lingvo*

(1985), *Sur la vojoj de la Analiza Skolo* (1987), *La esenco de la Analiza Skolo* (1988), *Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj* (1989) kaj, cignokante, *Ĉirkaŭ la skolo Analiza* (1997).

Rikardo Ŝulco — kiu konformigis eĉ sian nomon al la propraj lingvaj principoj — estis erudiciulo kun kies purismaj asertoj kaj avertoj oni ne ĉiam konsentis, sed kiu ludis nepre bonfaran — ĉar lingve konsciigan — rolon kiel atenta gardostaranto super nia lingvo.

Felix WOOLF (1908-1997), korifeo de la sud-afrika movado, forpasis la 8-an de aŭgusto en Kab-urbo, kie li estis iam delegito pri komerco. Ekkoninte Esperanton en 1946, li prezidis Sudafrican Esperanto-Asocion dum 6 jaroj, redaktis ties revuon *Bona Espero* tra 15 jaroj, kaj gvidis ĝian korespondan kurson tri jardekojn. Li verkis la kajeron *English Phrases and Expressions in Esperanto* (1969) kun aldono (1988).

OFICIALA INFORMILO

PATRONOJ DE TEJO 1998

Finnlando: Heta Kesälä; Jukka Pietiläinen; Akseli Kirsilä; Synnöve Mynttinen; Vuokko Tellervo Heinäsuo. Francio: Marc Savre. Germanio: August Franke; Nora Caragea; Franziska Reisel. Japanio: Koichi Kai. Korea Resp.: Sung Ho Cho. Nederlando: Hans ten Hagen; J. Soeteman; W.L. van Leeuwen. Norvegio: Margrete Landmark.

SOCIETO ZAMENHOF 1998

Finnlando: Heta Kesälä; Irma Heikkilä; Juho Pyykönen; Liisi Oterma; Meri Lehtinen; Synnöve Mynttinen; Terttu Tyynelä; Unto Seppälä; Veikko Tikkanen. Francio: André Albault; Clara Troper; Jean Gibaux. Germanio: August Franke; Harry Bily; Elisabeth Hirsch; Martin Gründler; Julie Winter; Jean Prager; Richard Hirsch. Japanio: Mituo Gotou; Keiko Syōzi; Hiroshi Takahasi; Tume Saitō. Korea Resp.: CHOI Yun-huy. Nederlando: M. van Bentum-v.d. Broek; G.A.M. van Bergeijk; Hans ten Hagen; E.C. Klaver; Maud Meijwes. Norvegio: Kjell Peder Hoff; Margrete Landmark; Olav Reiersøl. Svedio: Tomas Jansson. Usono: Arnold Victor; Gertrude Novak.

DONACOJ 1997 (NLG)

ĝis la 30-a de novembro

Fondaĵo Afriko: Italio: D. Trombetta

2401,80. Svedio: anonima 7,71. Sumo ĉi-jara 15 594,11.

Fondaĵo Ameriko: Finnlando: L. Oterma 215,00. Usono: kolekto San Francisco 101,62. Sumo ĉi-jara 2697,26.

Fondaĵo Canuto: Aŭstralio: T. Metherall 10,00. Britio: P. Danning 25,00. Hispanio: J. Raposo 20,00. Nederlando: A. Beuzenberg 108,00. D. van Zanten 50,00. Sumo ĉi-jara 6559,81.

Ĝenerala Kaso: Britio: P.M. Strapps 2614,59. Germanio: H. Bily 18,02; M. Gründler 27,00. Japanio: T. Yamamoto 19,16. Nederlando: G.A.M. van Bergeijk 94,00; P.A. Buijnsters 20,00; A.M.H. Dodebier 25,00; R. v. Es 9,00; J. Verhoeff 9,00. Sumo ĉi-jara 9851,25.

Konto Espero: Nederlando: T. v. Huis-Stratitsky 14,00. Sumo ĉi-jara 3440,76.

Junulara Fondaĵo: Francio: R. Despiney 107,68. Sumo ĉi-jara 3875,28.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Aŭstralio: T. Metherall 10,00. Aŭstrio: S. Stamm 35,00. Britio: B. Clarke 25,00; P. Danning 25,00. Hispanio: J. Raposo 20,00. Pollando: K. Babiarz 172,00. Sumo ĉi-jara 1478,98.

Volontula Fondaĵo: Aŭstralio: T. Metherall 10,00. Nederlando: A. Beuzenberg 100,00; G. Peet 50,00; L. Staghouver 22,00. Sumo ĉi-jara 3270,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Transpontu la atendon

Jam temp' está pensi pri la UK...

MONTPELLIER
01 - 08
aŭgusto
1998

83-a Universala Kongreso de Esperanto

kaj glufermi viajn kovertajn per la nova kongresa glumarko.
51x34mm. Blua-flava-verda. Folio kun 32 markoj: 7,50 gld.
Triona rabato ekde 3 ekz.

SIMPLE LA PLEJ BONA!

SESA ELDONO DE LA INTERNACIA LERNOLIBRO

AUDREY CHILDS-MILL
SALUTON!
ESPERANTO AUTODIDAKTE

**Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: 24,00 gld.
Sonkasedo: 12,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.**

ANONCU EN JARLIBRO 1998!

En la Jarlibro de UEA via anonco pri Esperanto-aranĝoj, libroj, gazetoj k.a. varoj atingos pli vastan publikon ol en iu ajn alia Esperanto-eldonaĵo. Pli ol 7000 aktivaj esperantistoj plurfoje vidos vian reklamon, ĉar la Jarlibron oni konsultas tra la tuta jaro.

Movada prezo Ekstermovada prezo

Kvarona paĝo	125 gld.	250 gld.
Duona paĝo	225 gld.	455 gld.
Tuta paĝo	415 gld.	825 gld.
Kovrilpaĝo	825 gld.	1650 gld.


Se vi varbas ekstermovadan reklamon, ni pagos al vi 30% de la prezo kiel maklerajon. Anoncmendiloj haveblas en Esperanto, la angla, franca, germana kaj nederlanda. Limdato por la mendoj: 31-a de januaro 1998.

Urseto venĝemas.
Erinaco ĉagreniĝas.
Museto ludas pianon.
Kaj kateto faras...

AGNIESZKA USAKIEWICZ

Kiel ĉiuj katetoj

Ilustris Aleksander Oczko. El la pola trad. Wojciech Usakiewicz.
Bielsko-Biala: KLEKS, 1993.
64p. 26cm. Plenkolora presita.
Bindita. Ok rakontoj por laŭtlegi kaj kunĝui familie. 24,00 gld.
Triona rabato ekde 3 ekz.



Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and Documentation of World Language Problems

**La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.**

Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.

Individua abono: 92,00 gld.

Institucia abono: 185,00 gld.

Abonu pere de la Libroservo de UEA.



En 1997 241 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en 1997 estis bela SZ-ŝlosilujo. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



"La baza celo de lingvo estas komuniki..."

Jen la principo malantaŭ la lernolibra serio *Tendaraj tagoj*. Ĝia reviziita dua kajero eĉ pli forte akcentas tion. Vidu kaj elprovu ĝin nun!

Tendaraj tagoj, kajero 2, Stefan MacGill, ILEI/UEA/HJEA, Budapeŝto, 1997. 72p. Ilus. de Pavel Rak. Mendu ĉe UEA: 15 NLG, triona rabato ekde 3 ekzempleroj.



KOMPUTILA LUDO
KUN PLI OL
150 LUDNIVELOJ

EN ESPERANTO KAJ 12 ALIAJ
LINGVOJ. 54,00 GLD. TRIONA
RABATO EKDE 3 EKZEMPLEROJ.
VD. "LASTE APERIS", P. 195.
HEJMPAĜO: WWW.ESPERANTO.PK/BILLY/.



FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu **patrono de TEJO**

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- TEJO tutmonde (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikaĵojn.

Cent jaroj (1896-1996) da stratoj, placoj, monumentoj, bustoj, kulturcentroj, tabuloj, parkoj, pontoj, asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER

Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Bormann. Rotterdam: UEA, 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabeloj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo: 18,00 gld. (Triona rabato ekde 3 ekz.)



Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

RIKOLTO DE 50 JAROJ

PAJLEROJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj.
William Auld. Rotterdam: UEA, 1997. 348p.
ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Prezo: 42,00 gld.

"La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de mia serioza verkado en Esperanto. La ĉefa rikolto de tiu verkado estas la kvindek de miaj libroj (ankoraŭ plimultiĝonta) sur breto en mia biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado postrestas surkampe pajleroj kaj stoploj, kiujn oni kutime forbalaas aŭ surtretas. — Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol nur efemeran, kaj jen la rezulto. Ekzemple, dum mia vivo mi verkis verŝajne centojn da librorcenzoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo al tempo mi pliprofondiĝis en la koncerna afero, kaj la rezultinta recenzo eble kontribuas al nia literaturesplora laboro. Tiajn do mi decidis 'savi'." (William Auld)

La libro estas aranĝita en kvar sekcioj: Eseoj, Rakontoj, Tradukoj, Libro-kulturo. Juvelo de la eldona rikolto ĉi-jara!

william auld

pajleroj

kaj stoploj

elektitaj prozaĵoj

universala esperanto-asocio